5-a Jaro. N-o 249 APERAS  SEMAJNE 11. Julio 1929

ESPERANTO JE LA SERVO DE L' TUTMONDA PROLETARO

# SENNACIULO

OFICIALA ORGANO DE SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA

REDAKTEJO: 14, avenue de Corbéra, Paris-12e
Gvidanto: E. Lanti

SIDEJO de Plenum-Komitato de SAT
23, rue Boyer, Paris-20e

ADMINISTREJO: Colmstr. 1, Leipzig O 27
Administranto: R. Lerchner

# LA TROLOĜATECO DE L'MONDO

Estas certe, ke la nombro da homoj kreskas, kaj eĉ multe; kaj tiu ĉi pliiĝo okupas kompreneble la sociologojn, demografojn kaj politikistojn. Ĉiu lando rezonas proksimume tiele: "La najbaroj, kaj eblaj malamikoj, plinombriĝas: necesas ankaŭ ĉe ni popol-plinombriĝo por povi konservi nian teritorion, nian sendependecon kaj nian tutecon."

Efektive lando trohomplena estas lando, kiu morgaŭ postulos pli vastan lokon ĉe la suno, novajn teritoriojn, precipe je kostoj de l' ne-troloĝataj landoj: tion faris Germanio en la komenco de l' jarcento; tion faras la nuna Italio (Musolini diris antaŭ nelonge: "Italio devas etendiĝi aŭ eksplodi"); tion faras ankaŭ Japanio. La troloĝateco, ĉu regiona, ĉu ĝenerala, povas konduki nur al konfliktoj, al teruraj militoj, ĉar temos elproprigi kaj ekstermi.

La pliiĝo de l' tutmonda loĝantaro ne estas dubebla. Certe oni ne povas observi ĝin tre malproksimen en pasinton. Sed de kiam regulaj statistikoj estas farataj, pli kaj pli precizaj precipe en la civilizitaj landoj, videbliĝas, ke dum la 19-a jarcento la ter-loĝantaro duobliĝis. Evidentiĝas ankaŭ, ke laŭ aktuala takso, ĝenerala, de la naskiĝoj, la duobliĝo devas okazi en tempo varianta de ses-dek ĝis okdek jaroj, malgraŭ la timiga infanmortado ekzistanta en diversaj regionoj. La duobliĝo eĉ devos produktiĝi ankoraŭ pli rapide, se ĉe sama stato de la naskiĝoj la infana kaj ĝenerala mortado malpliiĝas pro la "higienigo" de vastaj terpartoj: Ĉinio, Hindio ktp., kie nuntempe ankoraŭ furiozas mortado, kiun la sciencaj progresoj permesas multe malaltigi.

La fakto de l' konsiderinda kaj senĉesa pliiĝo, sen ekzemplo en la pasinto rilate al sia graveco, ne estas dubebla. Kaj ĝi okupas multajn spiritojn, kiuj trovas en ĝi motivon por maltrankvilo konsidere la estontan pacon de l' homaro. Ĉar, evidente, la pliiĝo de l' homkvanto ne povas daŭri senfine. La planedo ne estas elasta; ĝia surfaco estas limigita, kaj nuntempe, kiel en pasinto, la homoj estas devigataj, por vivi, engluti nutraĵojn. Ĉar ĉi lastaj estas provizataj de la tero, estas kompreneble, ke se la homaro kreskas, la terkultura produktado egale devas kreski.

Krome la demando pri la trohompleneco ĝenerale komplikiĝas per alia. Ekzistas ne nur, precipe en la civilizitaj landoj, troloĝateco — malgraŭ klare videbla malpliiĝo de naskiĝoj, kiel en Germanio, eĉ en Italio, dum la lastaj jaroj — ekzistas ankaŭ troindustriigo. Tio signifas pli kaj pli kreskantan tendencon de pliiĝo de la urba kaj industria loĝantaro je kostoj de la terkulturistoj. La plimulto forkuras pli kaj pli de la kamparo por invadi la laborejojn kaj fabrikojn de l' urboj aŭ antaŭurboj. De tie venas la malekvilibriĝo. Ĉar lando bezonas terkulturistojn por produkti la necesajn vivrimedojn por la kolektivo. Vere kelkiuj citos la internacian komercon kaj diros, ke la industririĉa lando aĉetos la vivbezonojn ĉe terkulturaj landoj, se restas da ili. Sed aliaj konsideroj aldoniĝas ĝenerale, kaj fakte en okazo de milito tiu lando, kiu malplej dependas de aliaj en sia provizumado, estas favorata. La troindustriiĝo konsistigas konsiderindan danĝeron: Usono estas ĝenata de ĝi kaj dezirus ricevi plue nur terkulturajn enmigrantojn. Germanio, kiu iam havis tro da kamparanoj, havas hodiaŭ tro da laboristoj. Italio serĉas parolante pri sia bezono "eksplodi": ĝi ne bezonas teritorian disetendiĝon: ĝiaj elmigrintaj kamparanoj ne terkulturas en Usono, sed laboras en minejoj kaj jam troplenaj fabrikoj. La terkulturo pli kaj pli mallogas. Francio perdis unu kaj duonan milionon da soldatoj, grandparte terkulturistoj: depost la milito la proporcio da fremduloj tie kreskis je unu kaj duona miliono: sed ĉiuj jetis sin sur la minejojn kaj fabrikojn, kaj ne sur la terkulturon, kiu malprosperemas.

Kio estas farebla? La vidpunktoj estas diversaj kaj kontraŭecaj. La anglo-usona tezo formuliĝas jene: La naskiĝoj estas troaj, kaj la proporcio fariĝos pli granda ankoraŭ per la malpliiĝoj de l' mortoj dank' al la higienaj kaj medicinaj progresoj. Se la nuna ekvilibro, kiu jam ne estas mirinda, kiel montras Ĉinio kaj Hindio, kie oftaj malsatperiodoj vidigas la senproporcion ekzistantan inter la loĝantaro kaj la disponeblaj vivrimedoj, devas daŭri, gravas, ke la naskiĝoj ne kresku proporcie je la mortoj. Necesas limigi la naskiĝojn, resume — la kuracilo troviĝas en la nov-maltuzianismo, en la vola limigo de l' naskiĝoj. Kaj tio eĉ ne sufiĉas, diras la anglo-usonanoj: oni devas instrui kaj propagandi tiun novmaltuzianismon, kiu ekzistas ĉe la bonstataj klasoj de la plimulto da civilizitaj landoj. Oni devas aldoni plie la praktikon de l' eŭgeniko. Oni devas malakceli la naskemon de multaj difektaj personoj, senvaloraj homoj, kiuj povas naski nur aliajn senvalorulojn, kies plimultiĝo estas tiom kara por la socio pro la kreendaj institucioj por gardi la vivon de nekapablaj kaj malutilaj civitanoj. La diversaj landoj elspezas grandegajn sumojn ĉiujare, por helpi al degenerintoj. Tiu ĉi mono estus miloble pli bone uzata por kuraĝigi la sanajn kaj produktokapablajn individuojn kaj helpi ilin en ilia tasko. Tio estas koncize la novmaltuziana tezo, klarigita en multnombraj artikoloj, libroj, paroladoj kaj propagandkunvenoj. Sendube multaj protestos en la nomo de l' moralo kaj religio, sed la adeptoj de l' doktrino respondas, ke oni devas pritaksi la kondiĉojn, en kiuj ĝi estis devigata kreski kaj multobliĝi.

Sed ĉu la nasklimigo estas la sola kuracilo? Aliaj neas tion. Ili diras, ke la terglobo troloĝiĝas, sed ke ĝi ne estas sufiĉe ekspluatita. Oni povas produktigi ĝin multe pli da rimedoj, por nutri miliardojn da plusaj individuoj. Oni ne devas troigi tiun fakton, sed vere en ĉiuj regionoj la ekspluato de l' tero estas pliintensigebla. Certe industriigo de l' terkulturo aperas tre dezirinda. Ne

# LETERO EL PERSIO

Karaj Ge-SAT-anoj! Multaj Gek-doj el la tuta mondo demandas min pri la vivo de l' laborula klaso en Persio. Tial mi kun plezuro respondas al ĉiuj, pere de tiu ĉi artikolo preparita post mia ĵusa vojaĝo el Afganio kaj tra Persio.

Mankas vortoj kaj fortoj, por priskribi al la SAT-legantaro la ĝustan tragedion, kiun nun travivas la orientaj popoloj, speciale la persa kaj afgana. Se iu



*Persaj kamparanoj.*

verkisto (ne burĝa) riskus alveturi ĉi tiujn landojn, sendube li trovus tie riĉan materialon por grandvoluma verko. En daŭro de kelkaj monatoj mi travojaĝis multajn angulojn de tiuj landoj, kaj ĉie mi vidis kortuŝajn bildojn, ĉie oni povas rimarki rezulton de agado de "eŭropaj civilizitaj ŝtatoj", "amikoj" de "sovaĝaj popoloj".

Almozeco, senlaboreco, prostituo, malsatado, malsanoj regas en mezo de l' laborula klaso. Kial ĉi tiuj ecoj ekzistas? Ĉar ĝis nun mankas en tiuj landoj iaj fabrikoj, fervojoj, ia moderna metio, lernejo kaj io alia. Dume ĉi tie regas malklereco, senalfabeteco kaj feŭdismo. Sed kial tio ĉio mankas, vi eble demandos? Ĉar orientaj popoloj estas "sovaĝaj", ili ankoraŭ ne estas "indaj" kaj "kapablaj" regi sian landon, — eble respondos ia reprezentanto de l' kapitalista mondo.

Sed mi devas respondi tute male: Orientaj landoj suferas, ĉar la imperialistoj de la tuta mondo dividis inter si la t. n. koloniojn, ĝenerale Orienton, regante per siaj "altaj ambasadorejoj" kaj "bankoj".

### La kontraŭstaroj al la persa registaro

Kiam la persa registaro projektas konstrui fervojon aŭ iun fabrikon, tuj en iu angulo de Persio okazos ribelo de duonsovaĝaj gentoj armitaj per modernaj armiloj, kontraŭ la centra registaro. Dum la registaro pensas pri forigo de tiu ribelo, la diplomatoj el "alta ambasadorejo" tuj solene vizitas la ŝahan korton por fari "konsilon" kaj doni "helpon".

Sekvantan tagon ni aŭdas, ke la ribeluloj malvenkis. Kial? Ĉar la projekto de fervojkonstruado estis forigata de la tagordo de l' parlamento. Jen, en regiono Ŝiraz (suda Persio), kie la loĝantoj estas kaŝgai (? Red.) ĝis 40—50 mil, ribelo okazis kontraŭ la centra potenco. Ĝis 10—12 mil soldatoj ("nizami") estis mortigataj de la ŝaha armeo, kaj ankoraŭ ni ne vidas finon. Kial okazis tiu ribelo? Ĉar alvenis la tempo, kiam "The Imperial Bank of Persia" — legu: la "bankoj de anglaj imperialistoj" devas ne plu eldoni banknotojn en persa valuto. Nun estas organizita "Banque nationale de Perse", kiu mem eldonas tiujn banknotojn.

Kial en tiuj landoj oni ne konstruas iujn fabrikojn? Ĉar tiuj demandoj aŭ decidoj estas tuj "enterigataj (malaperigataj) de iuj. Pasintan jaron, kiam en iu persa urbo estis decidite malfermi sukeran fabrikon, la ekleziuloj tuj protestis, dirante, ke la persa popolo faras pekon kontraŭ dio. Kiam en la tagordo de l' parlamento staris demandoj pri nova latina alfabeto kaj forigo de virina vizaĝvualo, estis same aranĝata agitado kontraŭ tiuj demandoj. Tamen decidon pri la konstruado de granda malliberejo neniu kontraŭis.

### Laboristoj — Kamparanoj — Virinoj

En primitivaj tapiŝpreparejoj, kie ĉefe laboras virinoj kaj knaboj ĝis-14-jaraj, kies labortago estas 12—14-hora kaj kiuj ricevas 10—30 ŝai (=0,05—0,15 dol.). neniu pensas defendi sin. La vilaĝkamparana vivo prezentas kvazaŭ epokon de 12. aŭ 13. jarcento. La kamparanoj loĝas en terdometoj, kiuj ankoraŭ ne vidis la lampon. Kiam ili ekvidas subite aŭtomobilon aŭ aeroplanon, ili forkuras, ĉar "diablo" sidas en tiuj maŝinoj. La kamparanoj laboras $^{2}/_{3}$-parte por la feŭduloj kaj nur $^{1}/_{3}$ por si mem. Akvo, tero, inventaro apartenas al feŭduloj. Persa kamparano laboras per "avaj metodoj". En riz-plantejoj en provinco Giljan, kamparanoj laboras kun tuta familio de frumateno ĝis la vespero, en mezo de akvo. Ili ĉiuj estas palaj, ĉar en tiuj plantejoj regas terura tropika febro.

En ĉefurboj kiel Teheran, Tabriz, Meŝed, Reŝt k Pahlevi por riĉuloj estas rimarkeble bela, festa vivo. Tiu vivo montras la eksteran flankon de la urboj. Rapidkurantaj, belaj aŭtomobiloj, virinoj en silkaj vualoj, junuloj diboĉantaj, ŝahaj oficiroj bele ornamitaj... Sed, bedaŭrinde, tio estas nur dekoreca bildo.

Ni rigardu la alian flankon. Tiuj samaj belaj persaj virinoj estas prostituinoj, kiuj serĉas aĉetantojn de sia korpo. La junuloj diboĉas, ĉar ili diras "tute egale, ni devas iam morti; do kial ni laboru kaj nin turmentu, dio donos por morgaŭ, ni ion trovos por manĝi". La mizero, senlaboreco, la timo pro malsato ĵetas tiujn virinojn sur la straton. Al ili neniu donos laboron, ĉar la leĝo malpermesas, ke ili havu ian metion; senalfabetaj ili estas. Do multaj el tiuj "belaj" virinoj estas veneraj.

La persa urbo kvazaŭ dormas la tutan tagon, nur vespere ĝi vekiĝas por la vivo. La stratojn plenigas tiuj samaj belulinoj, oficiroj, oficistoj. Bruo, aŭtomobiloj, kino kaj nenio pli. Jen kion la eŭropa civilizo donis al tiuj urboj.

### Ekspluatata malklero

Supre mi diris, ke en tiuj urboj mankas lernejo. Jes, laŭ mia vidpunkto; ĉar ekzistantaj ĉi tie kelkaj misiistaj lernejoj, kiel "Sankta Ludoviko", "Johanino d' Ark" kaj aliaj, lernigas kiel trifoje ĉiutage preĝi kaj obei al Jesuo. La cerbo de tiuj lernantoj estas plenigita per "homaranismo", "amo, paco kaj frateco". Bedaŭrinde la sperto de kleruloj el tiuj lernejoj ne pruvis, ke ilia laboro donas al la persa popolo ian rezulton, krom ke kelkaj fremdaj entreprenoj kiel banko, hindo-eŭropa telegrafo, poŝto varbas por tre malkara salajro oficistojn.

La persan popolan kason priŝtelas ĉiuj, kiuj havas ian, eĉ malgrandan oficon. Ĉiu ministro, deputito, faka estro, ĉiuspecaj kaj ĉiugradaj oficistoj havas postenon ne por la laboro, sed por la prilaboro de la t. n. "annam" — mondonaco, ĉar la ricevata de ili salajro tute ne kontentigas ilin.

Al Persio estis importataj lastjare ĝis je 12—15 milionoj da dolaroj nur ĉiuspecaj aŭtomobiloj, kiuj post kelkjara ekspluatado senvaloriĝas. Sed oni ne forgesu, ke por eluzo de tiaj aŭtomobiloj ankaŭ estas bezonaj diversaj apartenaĵoj kiel benzino, oleo ktp., kio plialtigas la suprenomitan sumon. Tamen por tiu mono ili povus konstrui en propra lando ian fabrikon, kie ne estus tiom da senlaboruloj.

Bedaŭrinde la kvanto de "granda

---

nur en la mezvarmaj zonoj, sed ankaŭ en la tropikaj kaj en la ĉirkaŭpolusaj regionoj. Sed fine oni venas al ia limo: laŭ Ist (East) la tero povus nutri 5 miliardojn da homoj: kaj ĝi havas jam 2. Post cent jaroj la loĝantara limo estus atingita, kaj la demando denove stariĝus, kiel daŭrigi vivadon. Ekzistas solvo evidente: la plej energiaj kaj plej bone armitaj loĝantaroj ekstermas la aliajn kaj alproprigas al si la teritoriojn. Tio estis la ĝisnuna kapitalista permilita reguligo de la demando, krom la faktoroj: malsato kaj epidemioj.

Tamen estas imagebla ankaŭ alia solvo. La kemiisto pretendas posedi ĝin. Li ridas pri la maltrankviloj de la demografoj, de l' sociologoj kaj speciale pri la zorgo, per kiu okupis sin Maltus pri la ekvilibro inter la terkultura produktado kaj la loĝantara nombro. La novmaltuzianismo, li deklaras, estas nur la rezulto de melankoliaj studadaĉoj de pesimista mondo, kaj de mondo neinformita, ne konante la grandegajn rimedojn de la scienco. Ĉar la scienco liberigos la homaron de la inkubo pri trohomdenseco. Dank' al la kemio, kiu ellaboros la sintezan nutraĵon. Ĝi jam komencis tion fari, sed restas ankoraŭ parto farenda. Ĝi plenumos ĝin. Helpe de la sunlumo kaj de la elementoj de aero kaj akvo, helpe de karbono, hidrogeno, oksigeno kaj azoto, ĝi kreos nutraĵojn. Tridek homoj laborantaj en fabriko de kelkmil metroj da surfaco produktos tiom da nutraĵoj sub formo de fermento, kiel povas ĝin fari mil terkulturistoj prilaborantaj 30 mil hektarojn laŭ la nuntempaj terkulturaj metodoj. La homaro povas kreski ankoraŭ longtempe. Certe oni ne povas rifuzi ioman krediton al la scienco. Ĉiukaze estus danĝere tamen tro kalkuli laŭ promesoj.

armeo da senlaboruloj" ne estas notebla, ĉar mankas statistiko. — Nu, mi konscie nenion diras pri aliaj importaĵoj, ĉar denove kelkdek milionojn da dolaroj mi devus prikalkuli.

Persio, Afganio, Beluĝistano, Irak dume estas grandaj kolonioj por la imperialistoj, ĉefe anglaj. Ili per sia kolonia politiko subtenas en tiuj landoj ribelojn, malklerecon, ekleziulojn, prostituon, "annamon" (mondonacon), sklavecon, sovaĝecon, "sanktajn lernejojn" kaj multon similan.

SAT-ano 2040, Teheran.

## La nacia reviviĝo en Blankrusio

**Zmitrok Bjadula**

Sub ĉi tiu pseŭdonomo skribas prozajn verkojn, blankrusia verkisto Samuil Plaŭnik. Li apartenas al la antaŭrevolucia plejado de blankrusaj poetoj-verkistoj. Bjadula estis hebreo laŭ nacio. Kiam komenciĝis la blankrusia nacia reviviĝ-movado, ĝi ankaŭ instigis hebreojn aliĝi al ĉi tiu. Bjadula kunligis sin kun la nacia reviviĝ-movado. Kiu estas Bjadula?

Li estas filo de malriĉa vilaĝa veturigisto. Li naskiĝis en 1886 en vilaĝo Posadec en Vilna-gubernio (estinta). Li estis tre malsana infano kaj pro tio komencis lernadon nur, kiam li havis 7 jarojn. Oni sendis lin en judan popolan religian lernejon "heder'o". Post lernado li helpis al sia avo en forĝejo.

La dekdujaran knabon la patro sendis en "jeŝiboton", lernejon, kie oni edukas judajn pastrojn — rabenojn. La dekdujara knabo devis komenci aranĝi sian vivon, zorgante pri si mem. Li manĝis ĉe sep hebreoj laŭvice, loĝis en sinagogo, lavis mem vestaĵon, kudris, flikis. Li eĉ perlaboris "kuiritajn terpomojn" — alkudrante butonojn al malnovaj pantalonoj de blinda rabeno.

Sed en "jeŝiboton" enŝoviĝis "revolucia spirito". Kelkaj lernantoj komencis lerni rusan lingvon. Post trijara studado en tiu edukejo Bjadula forkuris hejmen, kie li fariĝis jam hebrea instruisto, akirante ĉiumonate 1,50 rublon (= 0,75 dol.).

Deksepjara, li studis rusan lingvon per korespond-kursoj. Samtempe lia patro ŝanĝis la profesion. Li flosis arbojn. Bjadula kelkajn jarojn laboris en arbaroj, vintre ĉe hakistoj kaj somere ĉe riverbranĉo de Nemano. Vivis li kune kun vilaĝanoj, laboristoj. Tie li konatiĝis kun la blankrusa lingvo kaj aŭskultis multe da popolaj legendoj kaj kantoj. Li konatiĝis kun la vivo de l' blankrusa kamparano.



Bjadula jam scipovis rusan kaj blankrusan lingvojn. Li komencis verkadon de mallongaj rakontoj. Li havis senperajn interrilatojn kun vivaj homoj, parolante kun ili ĉerpis materialon por siaj verkoj. Pri socialismo li eksciis hazarde per iu socialisto, kiu vizitis lian vilaĝon. Lia unua versaĵo en rusa lingvo aperis en 1910 en ĵurnalo por komencantaj poetoj "Sur bordoj de Neva", poste aliaj versoj aperis en literatura almanako "Branĉoj" k. a. ĵurnaloj ("Arguso", "Ĵurnalo por ĉiuj"). En sama jaro aperis en blankruslingva gazeto "Naŝa Niva" (Nia kampo) lia unua rakonto: "Kantas noktpasigulo[1]". Post tiu rakonto li jam regule kunlaboris en tiu gazeto. En 1912 li eĉ veturis Vilnon por tie ofici en gazet-redakcio. De tiu tempo li partoprenis la popolan nacian movadon, kiun gvidis Blankrusa Socialista Gromada. En 1915 la registaro malpermesis eldonadon de "Naŝa Niva". —

Alproksimiĝis la revolucio. Bjadula antaŭe ne estis kaptita de tiu revolucia torento, sed poste li interligiĝis kun la revolucio, pentrante ĝin en siaj verkoj. Post liberiĝo de Blankrusio li kun aliaj poetoj (Ciŝka Hartni kaj Miĥas Ĉarot) komencis kanti "novajn melodiojn". Li multe skribis tiutempe. Liaj verkoj aperis preskaŭ en 10 diversaj ĵurnaloj. Li skribis rakontojn, versaĵojn, satirojn, artikolojn... La versaĵoj aperis en libroj: "Sub gepatra ĉielo (1922): "Ventego", "Poemoj" (1927). Rakontoj aperis en libroj: "Rakontoj", "Sur ĉarmaj grenkampoj", "Tanzilio". Krom tio li nun eldonis "Hebreoj en Blankrusio".

Post starigo de Soveta Blankrusia

[1] Oni nomas tiel en Blankrusio vilaĝanojn, kiuj nokte paŝtas ĉevalojn sur kampoj.

## Ĉu likvido de l' milito?

*Unu el la plej gravaj problemoj, kiuj staras nun antaŭ la gvidantoj de l' laborista klaso, estas decidi, ĉu nova mondmilito nun minacas kaj sekve, ĉu la kapitalisma regsistemo estas baldaŭ pereonta en Eŭropo. La polemikoj, kiuj okazas nuntempe inter diversaj tendencoj de la laborista movado, originas ĉefe de la fakto, ke ne ĉiuj gvidantoj respondas same al la ĉi supraj demandoj. Tial ni opinias, ke niaj legantoj legos kun granda intereso la jenan artikolon, verkitan sub formo de dialogo inter la ekonomiista redaktoro (Lora) de "Monde", — la gazeto, kiun direktas Henriko Barbüs, — kaj Francisko Delezi, jam konata de nia Legantaro.*

*La temo de la diskuto estas la rezultoj de la antaŭ nelonge finiĝinta "Konferenco de la Ekspertoj".* E. L.

Lora: La ĝenerala plano, laŭ kiu decas priĵuĝi la laboron de l' Eksperta Komitato, estas la demando pri la likvido de la milito. Multnombraj estas ankoraŭ tiuj, kiuj atendas, ke komplikiĝoj kaj renversiĝoj eliras el la ruinamaso, kiun la milito postlasis al ni. Oni konstatas dume, ke depost 1924, depost la Doz (Dawes)-plano, la kontraŭecoj deveninta] de la granda milito, malpliakriĝas. Temas do scii, ĉu tio estas efektive, hodiaŭ, la definitiva likvido de la lasta milito kaj de l' komplikaĵoj, kiujn ĝi estigis. Alivorte: en kiuj punktoj la plano Jang (Young) efektivigos progreson super la Doz-plano?

Delezi: La Doz-plano estis precipe eksperimento kaj provo. Ĝi ne havis kiel celon la definitivan likvidon de l' milito, sed la stabiligon de l' marko germana kaj la esploron pri provizora bazo, sur kiu oni povus, post ioma tempo, veni al definitiva reguligo. La Doz-plano fiksis nek la tutan sumon de l' germana ŝuldo, nek la nombron da jarpagoj. Ĝi antaŭvidis eĉ la aŭtomatan interrompon de la pagoj en la okazo se la germana valuto troviĝus ŝancelita. Neniu pordaŭra organismo estis destinita por efektivigi la transpagojn, pri kio sola la riparpaga agento, s-o Parker Gilbert, helpate de kelkaj komitatoj, estis komisiita. La plano Jang plene ŝtopis ĉiujn tiujn manklokojn. Multe pli: kunokazigante la germanajn pagojn kun la repagoj al Usono, ĝi solvas la demandon pri la inter-liganaj ŝuldoj. Fine, komisiante pri ĉiuj tiuj financaj agoj privatan organismon, esceptante la registarojn, ĝi antaŭmalhelpas ĉiun konflikton inter la ŝtatoj pri tiu ĉi dorna afero. Tio signifas do vere la likvidon definitivan de l' milito.

Lora: Ne ekzistas dubo, ke la Eksperta Komitato sukcesis forigi la frotpunktojn, kiuj teniĝis ankoraŭ en aŭ ĉirkaŭ la Doz-plano kaj kies kelkaj — la demando de l' transpagoj, la sumo da kostoj devigaj por Germanio, la inter-liganaj ŝuldoj — enhavis minacojn por la estonto, kvankam malpli gravajn ol tiuj antaŭ 1924.

Ĉar la proletaro sin montris nekapabla likvidi mem la militon, la financistoj likvidas ĝin... por sia profitkonto. Tamen, kvankam ni povus konsideri la militon kiel definitive likviditan, la plano Jang ŝajnas ebligi aliajn danĝerojn. Ĉi tiuj havas evidente neniajn rilatojn plu kun la "ĝenerala krizo" — ekonomia kaj politika — kiu devenis rekte de la milito, sed ili kroĉiĝas pli vere al novaj problemoj, precipe tiu de la premega superpezo ekonomia kaj financa de Usono kaj la minaco de la plena estriĝo usona super Eŭropo. Kune kun la deficito de nia komerca bilanco kaj kun la novaj usonaj protekt-impostaj tarifoj, oni starigis la demandon pri repago de niaj ŝuldoj.

La plano Jang fakte reguligas la repagojn. Sed ĝi antaŭvidas la kreon de Banko por Internaciaj Pagoj, kaj pluraj ĵurnaloj, mi citu nur la Belgan Sendependecon, metas jam la demandon: "Kia estos la Internacia Banko? — Ĉu ĝi estos eŭropa aŭ usona?" en dikliteroj, tra du kolonoj.

Ĉu tiu ĉi banko ne riskas fariĝi instrumento de la estriĝo usona super Eŭropo?

Delezi: Tiuj ĉi danĝeroj ekzistas nur en la imago de l' naciistoj. Legu la oficialan raporton: vi tie vidos, ke la administra Konsilantaro konsistos el dek

Respubliko li laboris kelkajn jarojn en redakcio de gazeto "Soveta Blankrusio", poste estis redaktoro de infana ĵurnalo "Steloj", nun redaktoro de ĵurnalo "Nia lando".

Bjadula skribis ankaŭ kelkajn artikolojn pri etnografio. Antaŭ nelonge aperis du verkoj ("Najtingalo" [el la vivo de servuta aktoro] kaj "Jazep Kruĵinskij") en ĵurnalo "Uzvuŝŝa". Bjadula estas hebreo laŭ nacieco — li eniris blankrusan literaturon, por tiele montri sian internaciecon. "Hebreo — estas 'vaganto' en 'fremda lando', — 'historia vaganto', kiu ne havas kaj ne havos patrion — tial do li sopiras pri tutmonda."

En siaj verkoj li estas pensulo. Pli per la saĝo ol per la sentoj li verkas prozon kaj poezion. Li estas poeto de penso. Unufoje mi parolis kun li pri esperanto: "Mi eĉ ne povas imagi, li diris, kiun gravan signifon havas esperanto por ia interligo de la diverslingvaj proletoj el tuta mondo. Oni eĉ ne scias, ke esperanto estas grava valoraĵo. Ĝi helpas al internaciiĝado de l' homoj."

Li esprimis sian deziron studi esperanton; li jam komencis tiun studadon. Ni lin salutu en la SAT-vicoj!

Dim. Snejko.

**N. LENIN:**

**Ŝtato kaj Revolucio**

150 paĝoj, formato 12×18 cm. Prezo 1 mk. g.

Mendu tuj ĉe la Administracio de SAT

R. Lerchner, Colmstr. 1, Leipzig O 27

# TAGO EL MIA VIVO

Mi estas 32-jara homo kaj studento en Komunista Universitato, kie komunistoj instruiĝas batali kontraŭ tutmonda imperialismo kaj kapitalismo, batali kontraŭ malkultura burĝa sistemo elrabanta kaj ekspluatanta tutmondon por siaj bestaj interesoj.



Mi volas priskribi konkrete mian lernan tagon.

Mi havas severan tempbuĝeton. Matene je la sepa horo mi ellitiĝas, laviĝas kaj iras por duonhoron gimnastiki. Post tio mi faras malgrandan promenon en urbon aŭ plej proksiman parkon. Je la 8-a mi matenmanĝas, trinkas kakaon aŭ kafon.

Je la 9-a mi iras en lernejon. Se estas lundo, mi studas ĵurnalistajn aferojn: ĵurnalfoton, prespublikaĵon kaj ĵurnalkunmeton. Depost la 15-a ĝis 17-a horo mi havas duhoran paŭzon por tagmanĝo kaj dormo. Je la 17-a mi eniras kun aliaj studantaj ĵurnalistoj pres-kabineton (en nia lern-presejo). Tie mi studas ĵurnalistan aferon, politikan ekonomion laŭ la "Kapitalo" de Karlo Marks, leninismon kaj historion de l' revolucia laborista movado en ĝisrevolucia Rusio kaj aliaj landoj.

Tiel ni tie laboras ĝis 23-a horo, havante malgrandan paŭzon por vespermanĝo. Se iu el la K-doj havas liberan tempon, li vizitas vesper-teatron, student- aŭ laborist-klubon, da kiuj ekzistas multaj en Ĥarkov. Se mi iam havas liberan tempon, mi vizitas literaturklubon je nomo de l' revolucia verkisto K-do Blakitna. Tien venas multaj verkistoj, ĵurnalistoj, poetoj, artpentristoj kaj scenej-artistoj. Preskaŭ ĉiuvespere oni legas tie lekciojn kaj faras diskutojn pri diversaj literaturaj kaj sciencaj temoj kaj tiel same kolektivan kritikon pri ies nova verko aŭ pentraĵo.

Malbone estas, ke niaj laboristoj de arto estas ne grupiĝemaj, kaj tial ne eblas organizi rondet-laborojn en la klubo. Ĝis hodiaŭ nia literatura klubo havas neniajn rondetojn. Por ellerni esperanton, mi organizis kun kelkaj K-doj student-ĵurnalistoj esperantan rondeton por dek K-doj en la studenta klubo el anoj de Komunista Universitato, kiu nun ĉesigis sian lernsezonon ĝis pli libera somera tempo.

Mi abonis ankaŭ al "S-ulo" kaj "La Nova Epoko" kaj studas ĉiuvespere post la laboro esperanton, interkorespondadas plie kun germana kaj aŭstriaj Gek-doj. La esperanta lernlaboro finas preskaŭ ĉiam, preskaŭ ĉiutage mian labortagon.

Aliajn tagojn mia universitata studenta vivo estas sama kiel lunde krom en ĵaŭdo, kiu estas partia tago. Tiam mi vespere iras en partian kunvenon por decidi diversajn demandojn el nia partia vivo.

K. S. Tereŝĉenko, Ĥarkov.

**KUN TIU ĈI NUMERO ESTAS EKSPEDATA "LA LERNANTO"**

ses direktantoj aŭ reprezentantoj de centraj bankoj en la ĉefaj landoj de l' mondo. El ili 7 reprezentas la emisibankojn de Francio, Germanio, Anglio, Belgio, Italio, Japanio kaj Usono, kaj 9 estas elektataj de la antaŭaj sur listo starigita de la centraj bankoj de aliaj landoj. Sume la usonanoj havos 1 voĉon el 16. Certe oni rilate al tio ne povas krii pri hegemonio. Se ili volus apliki ĝin, ili ne povus. Kaj cetere ili ne pensas pri tio, ĉar la nova organismo, se oni al ĝi lasos sian liberan ludon, donos al ili tiel multe kaj pli da servoj ol al aliaj landoj. Konsideru la funkciojn de la nova banko.

La BIP (Banko por Internaciaj Pagoj) estos komisiita pri ĉiuj bankaj agoj necesiĝantaj por la pago kaj distribuo de la germanaj jarpagoj. Ĝi transformos la germanajn markojn en dolarojn, sterlingajn funtojn, frankojn ktp. Ĉi tiuj funkcioj koncernis ĝis nun la ĝeneralagenton por riparpagoj. La amasaĉetoj je devisoj, kiujn ĝi devis plenumi, riskis senĉese plialtigi tiun monvaluton aŭ malaltigi alian. Por eviti tion, necesis konstantaj kaj malfacilaj traktadoj. Necesis konsulti la grandajn emisi-bankojn por ekscii, ĉu la unu havis troon, la alia deficiton. Unu devis prunti al alia. Rezultis el tio riskoj de ĝenoj en la valutoj. De nun, kiam la reprezentantoj de ĉiuj bankoj estas en la administra Konsilantaro, iliaj reprezentantoj estas konstante informitaj pri disponebloj je devisoj ĉe siaj bankoj. Ili povas prunti al si, unu al la aliaj, la necesajn devisojn por fari la interĝustiĝon kaj starigi konstantan ekvilibron.

Tiel oni evitos elvoki repuŝiĝojn sur la devisa merkato. La vendojn kaj aĉetojn sur la devisa merkato anstataŭos kontregistrado.

Lora: Ĝi estos do speco de internacia devisa "klirng haŭs" (angle: clearing house[1]).

Delezi: Ekzakte tio: publika servo farata al la tuta mondo.

Speciale du devisoj estas endanĝerigitaj: la marko kaj la sterlinga funto. Ĉiu scias, ke Germanio povis fari la transpagojn de l' Doz-plano nur dank' al dolarkreditoj, kiuj estis konsentataj al ĝi de Usono. Aliparte, depost monatoj, la kalkula bilanco de Anglio estas konstante deficita kaj, se oni lasus la aferojn en ilia normala paso, la enkasa oro de l' Banko de Anglio delonge jam pasus al Novjorko. Por tion eviti, la Banko de Francio kaj precipe la Federacia Rezerva Banko usona estas devigataj fari konstante al ĝi pruntojn en oro aŭ avantaĝojn en devisoj, kiuj siavice havas reefikojn sur la aliajn valutojn. De nun tio funkcios aŭtomate. Tiel, dank' al la mekanismo de l' BIP, oni fine sukcesos stabiligi la aĉetpovon de l' oro.

Oni scias, ke hodiaŭ Usono bezonas meznombre 153 or-dolarojn por havi la saman kvanton da varoj kiel por 100 dolaroj en jaro 1913. En Francio oni bezonas proksimume 120. La aĉetpovo de l' oro sekve malplivaloriĝis depost la milito kaj diference laŭ la landoj. Rezultas el tio, ke franca eksportisto, kiu vendas sur la internacia merkato la saman produkton kiel lia usona konkuranto kaj je la sama prezo, t. e. 100 dolaroj, en la momento kiam li portis siajn 100 dolarojn en Francion, povos pagi per tiu ĉi sumo sur ĝia interna merkato pli da varoj kaj pli da salajroj ol lia usona konkuranto en Usono. Tiu ĉi diferenco en la malplivaloriĝo de l' oro kreas do veran eksport-premion je profito de la landoj, kie la oro estas pli malofta, je la malprofito de tiuj, kie ĝi estas pli abunda.

Iom post iom, per la agoj de tiu ĉi "klirng haŭs", kia estos la Internacia Banko, oni travivos novan dispartigon de l' oro, kiu niveligos la aĉetpovon, ne komplete, sed senteble, kaj la diferenco restos ĉiam la sama. Tiel oni evitos la malreguliĝojn, kiuj povas estiĝi en la internacia komerco. Krome, kiam oni starigas repagojn de ŝuldoj en oro por tridek aŭ sesdek jaroj, estas grave certiĝi, ke la oro havos ĉiam la saman valoron.

(Finota.)

[1] Bankinstituto en Londono k Novjorko por ĉeka k kambia interŝanĝoj sen kontantaj transpagoj.

## Banekskurso k propagando

Post unuhora veturado per vagonaro de Leipzig laŭ sudorienta direkto oni atingas la vilaĝon Grosŝtajnberg (Grosssteinberg = Grandŝtonmonto), en kies proksimo troviĝas la hejmo de l' turistasocio "La Naturamikoj", loka grupo Leipzig. Ĝi estas masiva duetaĝa domo, kiu estas bone akomodita al la ĉirkaŭaĵo. Oriente k sude ĝin ĉirkaŭas arbaro k ŝtonrompejoj, norde k okcidente vastaj, fruktodonaj herbejoj k kampoj. Okcidenten oni havas belegan perspektivon al ebena tereno. En la teretaĝo troviĝas la mastrumejoj k rest-



adejo. Oni trovas tie ĉiujn presorganojn laboristajn, ankaŭ "S-ulo"n. En la supra etaĝo estas tranoktejoj proksimume por cent personoj. Precipe la junularo volonte vizitas la hejmon je la semajnfino. Ofte ne ĉiuj povas ricevi tranoktejon; tial somere la naturamiko konstruas grandan tendon en apuda arbaro. Kiu ne povas elspezi multe da mono por vasta veturado, tiu trovas tie bonan restadon dum libertempo, sed oni devas esti minimume sindikatano. Manĝaĵo k trinkaĵo estas aĉeteblaj por meza prezo, sed ne alkoholaĵoj. Por bani ankaŭ sufiĉe granda lageto kun pura akvo kaj sabla fundo troviĝas en proksimo. La domon konstruis plej parte la naturamikaj K-doj mem dum libera aŭ senlabora tempo. Eĉ la materialon ili transportis tien per malgranda veturilo. Ĉar la konstruado okazis dum la germana inflacio, ili ne povis lui ŝarĝaŭtomobilon aŭ ĉevalveturilon. Ĉu tio ne estas vera idealismo?

Pasintan dimanĉon la esp. sekcio "Okcidento" de l' grupo Leipzig entreprenis banekskurson al tiu loko. Bone elektita estis la tago, ĉar samtempe okazis ĝenerala renkontiĝo de l'Leipzigaj Naturamikoj. Banante k movludante ni travivis la tagon, dum nia esp. standardo flirtis apud ni. Kiam estis aŭdeblaj niaj popol- k batalkantoj esperantlingve, multaj ĉeestantoj ĉirkaŭis nin. Granda parto inter ili promesis al ni viziti la kursojn por komencantoj venontan aŭtunon. La sekcigvidanto eĉ interkonsentis kurson ĉe loka grupo de l' komunista junulara asocio.

Hejmveturinte ni estis konsciaj, ke ni sukcese propagandis por nia movado. Estonte ni agos same.

B. Weinert (10 889), Leipzig.
(la unua en la vico).

---

**Kutimiĝu al regula legado de esperantaj tekstoj abonante la semajnan gazeton SENNACIULO!**

# DISKUTEJO

### Respondo al kataluno

Kiom molanima vi estas, K-do, pro tiu vorto "panjo". Mi vetas, ke "panjo" paroliĝas, en kataluna-lingvo: "Mama", aŭ "mamu", aŭ iel simile. "Mama" estas tute sennacia. Germanidoj, italidoj, hispanidoj diras "mama". Francidoj, kvankam ili poste lernas diri "maman", elparolas unue, dum la suĉmonatoj, "ma-ma-ma-ma", pli facila movo de la lipoj, sama kiel por suĉi. Ruslingva "mat", latina "mater", aziaj vortoj inter "mè" (anam-landa), "ma" (hinda), mi, mu, mö ktp., kiuj ĉiuj signifas "panjo", samaj ankaŭ sendube en aliaj kontinentoj, montras, kiel hominstinkta estas tiu krio "ma-ma-ma-ma". Do, tute ne kataluna.

Pli malfrue, kiam ĝi scios kompreni, la infano konsentos, ke ĝi diris "mama" en esperanto, tute gramatike, ĉar ĝi intencis diri, dum suĉmonatoj: "mama, mama patrino, mamo de virino, lakto".

Nur poste, kiam ĝi fariĝis "jam peke fi-voluptema", dirus kristanaj pastroj, ĝi ankaŭ vokas "maman (patrinon)" ne nur por trinko, sed eĉ por karesoj, kontraŭ doloroj en vivo, ekzemple varma mankareso sur suferanta ventro, kiu mildigas doloron, ridigas infanon, jam seks-vekas nervojn, ĉar ĉio estas seksa, dum la tuta vivo.

Ĝis la tago, kiam la infano, dudekjara, vokos lastfoje "mama, mama", vundita sur batalkampo, "mama" kontraŭ nekomprenata morto.

Do, "mama" estas tute sennacia instinkta vorto, kiu nur en esp-o alprenas kompletan signifon, pri mamo.

Nun, pri la "restaĵo" de ĉiu patra lingvo (patrina lingvo, se vi volas, ĉar virinoj estas pli babilemaj kaj artistaj), pri ĉiuj aliaj vortoj de ĉiu regiona dialekto. (Regiona, nacia, tute sama.) Mi dankas miajn gepatrojn, miajn geavojn, ĉar ili estis sufiĉe inteligentaj por verŝi al mi kun lakto francan lingvon, kaj ne dialekton de mia speciala regiono, de "mia Katalunio", kiu estas Limuzio, en centra Francio. Same, alzacaj infanoj dankas gepatrojn, kiuj lernigis al ili germanlingvon aŭ franclingvon, kaj riproĉas gepatrojn, kiuj nur instruis al ili "elzesiŝ", alzacan dialekton kvazaŭ ne skribatan.

En ĉiu regiono de ĉiu lando krom "irredentaj" regionoj[1], precipe en vilaĝoj kaj laboristaj kvartaloj, geviroj hezitas inter tiuj du sentoj: Aŭ moki pri kiuj kuraĝas paroli la literaturan lingvon (ĉar li "afektas esti sinjoro"), stulta sento, kiu malaperas antaŭ lernejo, kulturo, vojaĝoj, radio, — aŭ lernigi al infanoj la literaturan lingvon, kaj paroli ĝin, ĉar gepatroj komprenas kiom malhelpa estas neskribata dialekto en tutlanda vivo. (Poste, ili komprenos la samon pri tutmonda vivo.)

Ĉiu vi aŭdas en Francio: "Ho, 'Mademoiselle' ne konsentas paroli dialekton! Kiel afekta!" (kaj bedaŭrinde la "Demoiselle" fakte, krom lingvo, afekte kaj senracie moŝtiĝas). Sed troviĝas ĉiam iu por respondi: "Ŝi pravas. Tro afekte, sed ŝi pravas. Ni stultuloj en vilaĝo (aŭ kvartalo) mem malhelpas per dialektaĉo. Inteligentajn geknabojn de laboristaj familioj prokrastigas dialekto je jaroj, dum kiuj stultaj burĝidoj pli bone sukcesas ol ili..."

Neniu pretendas forŝiri el buŝo la patran dialekton. Kontraŭe, oni ĝin pli bone konas, admiras, studante ĝin lingvo-science, ne stultiĝante en ĝi. (Multaj popolanoj, kiuj nur parolas dialekton, samtempe konsideras sian dialekton kiel ridindan, kaj nur ŝercas pri ĝi...)

Mi, limuzo, ŝatas limuzan dialekton, same kiel mi ŝatas limuzan fromaĝon el kaprin-lakto. — Vi ŝatu kaj manĝu, K-do kataluno, vian katalunan fromaĝon. Sed atentu ne tro pasiiĝi en tiu ŝato, ĝis konsento mortigi kaj morti pro tiu fromaĝo, batalante kontraŭ kasteljanaj fromaĝistoj.

Vi tute eraras, K-do, kredante, ke nur "irredentaj" patrioj posedas propran lingvon sufiĉan por formi apartan patrolandon. Ŝajnas al mi, ke vi nur legis faŝistan literaturon, hispanan, italan, katalunan. — Ekzemple en Francio, kiun mi iom konas, provencala, gaskona, limuza lingvoj estas tiom vivoplenaj, kiom "elzesiŝ" en Alzacio (kiu estas pli germana ol franca), kiom bretona lingvo en Bretonio. Irredentaj regionoj formas en mondo ridindan societon, ĉiu pledas por ĉiuj, katalunoj pledas por irlandanoj, kiuj ne havas lingvon (legu antaŭparolon de irlandano por "Mary Semblant", libro de irlanda verkisto: "Nia lingvo estas angla lingvo"), Irlandanoj pledas por bretonoj, kiuj ne havas limojn, estas jam longe kunfanditaj kun francoj. Bretonoj pledas por Besarabio. Pri tiu lasta mi rimarku, ke granda geografo-anarkisto Elizeo Röklü (Elisée Reclus), protestis kontraŭ rusigo de Besarabio, ĉar Rusio estis cara. Nun Rusio estas soveta. Besarabio tre ŝatus fariĝi soveta, kaj ni tre ŝatus, ke ĝi estu restinta "rusa" por sovetiĝi. Libereca movado de antaŭmilita Besarabio perdigis ĝian nunan liberecon. Pri Georgio nun, kion, kiom, kial oni tiom rakontas...

Alzacaj pastroj pledas por liberaj Alzacio kaj Flandrio, ĉar Belgio-Alzaco-Bavario-Italio formus tiom belan katolikan ŝtaton.

Ni sennaciuloj ne plu bezonas zorgi pri tiaj stultaĵoj. Pasis la jarcento de Dante Aligieri, kiu deziris por Italio germanan imperiestron, kontraŭ katolikismo tiam perfide reganta super neregemaj italaj princetoj. Sennaciismo sufiĉas por liberigi regionajn lingvojn. Nia patrio estas tutmondo. En ĝi dialektoj, lingvoj, mondkonataj fromaĝoj kaj regionaj fromaĝetoj estos ŝatataj laŭ ĉies gusto. Homo, kiu helpas milit-iron kontraŭ ia patrolando, por alia patrolando, nur preparas por infanoj la plezuron morti dum senutila batalo kriante la sennacian "mama". 7359

[1] Regionoj per anekso disigitaj de samlingvio.

# SENNACIULA EDUKISTA PAĜO

Kontrolata de l'Eduklaborista sekcio de SAT
Redaktas: Tutmonda Esperantista Pedagogia Servo (TEPS). / Sendu materialon al: M. Boubou, 96 rue Saint-Marceau, Orléans (Loiret), Francio

## ALVOKO

### de la feministinaj grupoj el la ruĝa franca geedukistaro — al ĉiulandaj edukistinoj

Karaj K-dinoj! — Preskaŭ ĉie, la servutigaj katenoj, kiuj premas la viran edukistaron, ja pli forte premas la virinojn — edukistinojn.

En preskaŭ ĉiuj landoj el tutmondo, la edukistino jam elportas sian sklavecon, kiel ajna virino. Eĉ se ŝia profesia preparo ne estis mallongigata kaj ŝia salajro malpliigata kompare kun tiu de l' instruisto, tiuokaze ofte la leĝo kaj ĉiam la tradicia moralo malpermesas al ŝi la plej elementajn rajtojn en la privata, familia, socia vivo.

En Britio, Svisio, Finnlando, Luksemburgo, Svedio ktp..., en 10 eŭropaj landoj, la salajro de l' edukistino estas malpli alta ol tiu de ŝia kamarado edukisto. En kelkaj landoj (Holando, Svedio, Finnlando, ktp....), la instruistinoj, kiuj zorgas la tiel delikatan edukadon de la plej junaj infanoj en la "etulaj klasoj", estas konsiderataj, kiel "malsuperaj edukistinoj", por kiuj ne necesas longa pedagogia preparo, sed por kiuj sufiĉas duon-salajro!

Eĉ ankoraŭ estas landoj (Germanio, Britio, Holando, Svisio, ktp....), kie celibato — senedzeco — estas deviga por instruistinoj: al ŝi estas malpermesate, fondi familion! Ŝi devas esti monaĥino komisiita por edukado! Se ŝi edziniĝas, ŝi forlasu la edukoficon!

En kelkaj landoj (Rumanio, Svedio, Luksemburgo, Italio, Finnlando...), ankoraŭ nun, la edzino-instruistino rajtas neniun tute pagatan akuŝan libertempon. Ŝi devas pagi el sia propra salajro la salajron de sia anstataŭantino — ĝuste en la momento, kiam kreskas ŝiaj monbezonoj kaj prizorgoj.

Ĉie, krom eble en sovetaj respublikoj, politika-religia moralo de burĝaro trudas siajn stultajn antaŭjuĝojn al privata vivo de l' edukistino.

En ĉiuj kapitalistaj ŝtatoj, oni povas ankaŭ konstati klaran tendencon al porvirinigo de l' eduka profesio. Sed la registaroj ne trompas nin, ĉar ni scias ja, ke ili preferas instruistinojn (pli ol instruistojn) nur tial, ke virino jam senigita je politikaj kaj sociaj rajtoj ne kuraĝos postulegi siajn profesio-rajtojn.

Esperu nenion de pli malpli demokrataj registaroj, eĉ en landoj, kie virino akiris rajtojn voĉdoni kaj "parlamentani".

Emancipo de l' edukistinoj estos la laboro de l' edukistinoj mem, helpataj de laboristaro, klasfrataro kaj klasfratinaro. Edukistino estu ĉe la kapo de virina movado, same kiel ŝi estu ĉe la koro de movado de laboristaj amasoj.

* * *

Vi, K-dinoj instruistinoj jam aliĝintaj al sindikatorganizoj — vi, koleginoj el landoj, kie apartaj postuloj devigis vin starigi apartajn instruistinajn asociojn (Britio, Svedio) — ankaŭ vi, koleginoj izolaj aŭ apartenantaj ankoraŭ al grandaj neŭtralaj" edukistaj asocioj — ni, feministinaj grupoj el la ruĝa franca geedukistaro, ni vin instigas aliĝi senprokraste la solan proletecan kaj unuecan tutmondan edukistaran organizon, kiu defendas la interesojn de la tuta tutmonda geedukistaro: ĝi estas Internacio de l' Eduklaboristoj (Parizo).

Ni insiste petas, ke vi respondu al ni, ke vi daŭrigu niajn interrilatojn, ke vi kreu la internacian kunligon de du milionoj da tutmondaj edukistinoj.

Kion volas edukistinoj sur tutmondo? Samajn rajton, kiel K-doj edukistoj! Egalan salajron, egalan kulturon, egalajn ĉiajn rajtojn inter edukisto kaj edukistino!

Pagatan akuŝan libertempon longedaŭran!

Plenan liberecon en sia privata vivo!

Sian rajton al politika kaj socia vivo!

Klaskonsciaj kaj rajtopostulaj edukistinoj, aliĝu al:

Internacio de l' Eduklaboristoj Sekretario — K-do Vernochet — 8, Avenue Mathurin-Moreau — Paris XIX. Kaj nepre respondu al ni.

Niaj esperanto-perantoj:

Marthe Planchon, 30, Avenue de la Somme Sucy-en-Brie (Seine-et-Oise), Francio aŭ: Marcel Boubou, 96, rue Saint-Marceau Orléans, Francio.

Feministinaj Grupoj
el Ruĝa Franca Geedukista Federacio.

## DIVERSLINGVA LERNEJO EN BLANK-RUSIO

Nacia kaj kultura demandoj en cara Rusio estis solvataj tre simple: devas esti sur la tuta teritorio de l' grandega imperio nur unu nacio kaj unu kulturo — rusa. Blankrusio, kiu havas en la nunaj siaj sovetaj limoj kvinmilionan loĝantaron, ne havis eĉ unu blankrusan lernejon. Ĉio, kio rilatas al la naciaj specifaj trajtoj, estis anoncata de la cara oficistaraĉo, kiel "muĵika", vulgara. Estas kompreneble, ke blankrusaj lingvo kaj kulturo konserviĝis nur en la laborulaj amasoj. Sinjoraĉo, burĝaĉo neniam sin apartenigis al blankrusa nacio.

Oktobra revolucio, kiel ventego forblovinta regadon de polaj sinjoraĉoj kaj hebreaj bankistoj, rusaj oficistaĉoj kaj iliaj blankrusaj subtenantoj starigis antaŭ ni grandegan taskon — konstruadon de nacia blankrusa kulturo, kiel parton de la tutmonda socialista kulturo, proleta laŭ enhavo kaj nacia laŭ formo. Unua ĉeno de l' kulturo estas lerneja edukado. Tial necese estas naciigi ĝin, enkondukante instruadon en naciaj lingvoj; rekonstrui lernejon, akomodante ĝin al la bezonoj de l' socialista konstruado kaj altiri al la lernejo plej vastajn amasojn de l' laboruloj.

10 jaroj da Soveta potenco en Blankrusio en lernejaj sferoj faris multon. Multaj malfaciloj staris sur la vojo al solvado de l' nacia problemo en edukado, ĉar en Blankrusio en proksimeco kunvivas multaj nacioj — blankrusoj, hebreoj, poloj, rusoj, litovoj kaj aliaj. Tute forestis lernolibroj nacilingvaj kaj instruistoj precipe por hebreaj, polaj, litovaj lernejoj. Nun la malfaciloj estas venkitaj. Sekvonta tabelo montros, kiel dismetiĝas blankrusaj amasaj lernejoj laŭ lingvo de instruado (laŭ Tutsoveta lerneja registra Fako 15. 12. 1927.

Komunikis: P. Krapivin (6351).

## SUFERAS POLAJ INSTRUISTOJ...

Mi informu vin pri la abomena vivo de l' edukistoj en Polio, eĉ en ŝtataj lernejoj, kie la salajro estas firme fiks-

## Diverslingva instruado en Blank-Rusio

| Lingvo de instruado | Kvarjaraj lernejoj | | | | | | Sepjaraj lernejoj | | | | | |
|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|
| | Nombro da lernejoj | | Nombro da instruistoj | | Nombro da lernantoj | | Nombro da lernejoj | | Nombro da instruistoj | | Nombro da lernantoj | |
| | Nombro | % | Nombro | % | Nombro | % | Nombro | % | Nombro | % | Nombro | % |
| Blankrusa ..... | 4363 | 84,5 | 6153 | 79,2 | 296182 | 83,0 | 176 | 57,1 | 2193 | 52,8 | 66563 | 60,0 |
| Hebrea ....... | 146 | 2,8 | 445 | 5,7 | 11212 | 3,2 | 53 | 17,2 | 733 | 17,6 | 13778 | 12,4 |
| Pola ......... | 129 | 2,5 | 162 | 2,1 | 6159 | 1,7 | 12 | 3,9 | 145 | 3,5 | 2627 | 2,4 |
| Rusa ......... | 118 | 2,3 | 289 | 3,7 | 11299 | 3,2 | 18 | 5,9 | 305 | 7,4 | 7910 | 7,1 |
| Rusa kaj blankrusa | 362 | 7,0 | 646 | 8,3 | 29746 | 8,3 | 40 | 13,0 | 600 | 14,4 | 15988 | 14,4 |
| Aliaj ......... | 45 | 0,9 | 76 | 1,0 | 2060 | 0,6 | 9 | 2,9 | 180 | 4,3 | 4078 | 3,7 |
| Sume: | 5163 | 100 | 7771 | 100 | 356658 | 100 | 308 | 100 | 4156 | 100 | 110944 | 100 |

# TRA ESPERANTIO

## Porkongresa Raportaro

### ESPERANTO-SERVO DE SAT

**Raporto pri funkcio dum la 1-a kvaronjaro 1929**

Esperanto-Servo de SAT jam fariĝis pli aĝa, do ankaŭ pli matura infano de nia proleta esp. movado tutmonda. Tiu fakto samtempe montras al ni aliajn, novajn vojojn, por plenkreskigi nian infanon "Esperanto-Servo". Unue necesas tamen doni koncizan raporton pri ĝia funkcio.

En la 1-a kvaronjaro 1929 estas dissenditaj 121 raportoj el k pri 19 landoj: Alĝerio 1, Argentino 2, Belgio 7, Britio 20, Bulgario 11, Danio 2, Estonio 5, Finnlando 1, Francio 2, Germanio 20, Hungario 2, Japanio 2, Jugoslavio 6, Kanado 1, Latvio 4, Litovio 2, Polio 14, Sovetio 17, Svisio 2. Tiu statistiko evidente montras gravan mankon da raportoj el grandaj regionoj.... La terglobo estas sufiĉe granda, por ke ni ankoraŭ povu atingi multon!

La cititaj raportoj laŭ nekompleta raportado (revenis nur 23 raportfolioj el 13 landoj, dum Esp.-Servo dissendas sian materialon al ĉ. 125 Gek-doj en pli ol 30 landoj) estas presitaj en 265 n-oj de gazetoj. En la 1-a kvaronjaro 1929 ankoraŭ aperis raportoj el pasintjare dissenditaj materialo en 37 gazetn-oj. Do aperis sume en la tutmonda gazetaro raportoj el Esp.-Servo en 302 gazetn-oj.

Plej ofte aperis el la raportoj nunjare dissenditaj: Fakto el Alĝerio (raportn-o 73 — 9-foje); Kontraŭrevoluciaj filmoj — el Jugoslavio (30 — 8-foje); Laboro de rusaj elmigrintoj en Jugoslavio (31 — 8-foje); Vivo de la kamparana junularo en Germanio (9 — 7-foje); Kulturaj atingoj en Sovetio (14 — 7-foje); En Latvio — 18 mil senlaboruloj (38 — 7-foje).

La raportoj aperis: 6-foje — 10, 12, 18, 32; 5-foje — 4, 6, 7, 15, 28, 63, 68, 76; 4-foje — 11, 23, 27, 35, 37, 42, 52, 57, 58, 69, 78, 79, 80; 3-foje — 8, 22, 29, 36, 45, 46, 51, 59, 64, 67, 83; 2-foje — 2, 17, 26, 33, 44, 48, 49, 50, 53, 55, 66, 70, 71, 72, 74, 82, 84, 86, 106, 107, 108; 1-foje — 5, 13, 16, 25, 34, 39, 40, 41, 43, 56, 60, 61, 65, 75, 77, 85, 87, 88, 89, 98, 99, 105, 112, 113, 118, 119. Necititaj raportoj ne estas presitaj. Pli kompleta raportado pri funkcio certe montrus ankaŭ pli kontentigan rezulton...

Ne entenita estas la raporto de K-do Tilin-Leningrad, el kiu ni konigu jenon:

„Estas uzitaj jenaj n-oj de E. S.: 479, 481, 482, 487, 489, 495, 497, 498, 499,


**POST TRI SEMAJNOJ**

**nia granda varbado devas alporti al ni la**

**4000-an ABONANTON!**



**"S-ulo" bezonas lin por regule povi aperi en amplekso de 12 paĝoj! Ĉiu unuopa helpu al ni!**

**Intensigu vian fortostreĉon!**


500, 502, 503, 505, 506 (pasintjaraj), 2, 3, 4, 5, 8, 9, 11, 15, 18, 19, 20, 21, 23, 29, 30, 31, 35, 36, 37, 38, 39, 42, 45, 46, 48, 49, 50, 55, 56, 57, 58, 59, 63, 64, 65, 68, 69, 71, 73, 76, 78, 79, 80, 81, 82, 83, 85, 86, 88, 89, 95, 107 108. — La materialo estas tradukita, deksesobligita skribmaŝine, k per ĝi ni priservis 51 murgazetojn, sindikatĵurnalojn, taĝĵurnalojn, entreprenejajn presgazetojn, radiogazeton. — Apartaj leteroj tradukitaj el E. S., "S-ulo", ricevitaj de ĉeloj-kursoj, labkor-oj ktp: 97; post multobligo estas disdonitaj al murgazetoj, laborejaj presgazetoj, profunuiĝaj ĵurnaloj, radiogazeto, eksterurbaj gazetoj, taĝĵurnaloj, "vesperoj de alilandaj leteroj": 1035. — Estas uzitaj: en mur-, pres-laborejaj gazetoj 590, en radiogazeto disaŭdigitaj 70, en "vesperoj de leteroj" laŭtlegitaj 15, en profunuiĝaj gazetoj presitaj 21, en la urba gazetaro presitaj 9; do sume 705."

La raporton de K-do Tilin ni aparte publikigas por montri, ke en kelkaj lokoj la raportoj estas modele utiligataj, sed entenado en la statistiko ne estas ebla.

* * *

Ni esperas, ke tiu raporto plej konciza pruvas, ke la Esp.-Servo ne estas fuŝa entrepreno de nia Asocio. Ĉiam pli ĝi okupas la paĝojn de la laborista gazetaro en tuta mondo. Tamen montriĝis gravaj mankoj. La multobligitaj bultenoj de Esp.- Servo ĝis nun nur venis en la manojn de malmultaj Gek-doj...

Por vastigi la rondon, kiu estonte aktive partoprenu la laborojn de Esp.-Servo, ni faris proponon al la 9-a Kongreso, ke depost la 1-a de oktobro k. j. la raportoj de Es.-Servo okupu 1—2 paĝojn ĉiusemajne en la oficiala organo de nia Asocio "S-ulo". Nia infano demetu la infanajn ŝuojn, vestu sin per ŝuoj por pli aĝaj infanoj k tiel plej rapide kresku al plenaĝulo. Kvankam laŭbilde ni motivas la pravecon de tiu vojo, al ni la efektivigo nur estos plia paŝo por ĝenerala aplikigo de esp-o en la rilatoj reciprokaj de la tutmonda Proletaro. Do aprobu tiun proponon, sed poste ankaŭ aktive helpu ĝis la plena venko.

C e n t r e j o d e E s p. - S e r v o.

### KONCIZA RAPORTO DE SAT-LITERATUR-KOMISIONO 1928—1929 (15. 6.—15. 6.)

Dum la lasta jaro la Komisiono plenumadis sian kutiman laboron de manuskripto-kontrolado k recenzado. Bedaŭrinde pro kaŭzoj, nedependaj de la Komisiono, nur tre malmultaj verkoj aperis. 8 libroj estas presitaj dum la lasta jaro:

L a v o j o al scienco d e e s t o n t o de Fersman (kontrol. de Liter. Komis.).

P e t r o III-a eldono (korektita de Liter. Komis. laŭ diversaj proponoj kolektitaj dum du jaroj).

K a n d i d de Volter (kontrol. de Liter. Komisiono, sed kun ĝiaj rimarkoj la tradukisto ne konsentis[1]).

P r o l o g o de Miĥalski (n e kontrolita interkonsentita).

D i a b l i d o j de Bartelmes (n e kontrolita, sed interkonsentita).

[1] *La "rimarkoj" rilatis al la uzo de la tempo e s t i s* **-ata** *anstataŭ estis -i t a ĉe verboj k al la formo m o r t i ĝ i anstataŭ m o r t i en okazoj, kiam f a k t e ne mortas la koncerna rolulo en Kandid.*
*Tiuj rimarkoj pri la "rimarkoj" de la L. K. estas necesaj por ke la leganto ne havu eraran komprenon pri la signifo de la ne-konsento.* — E. L.

---

ita kaj certa. Instruisto, kiu ne "dancas laŭ la fajfilo" de Pilsudskia reĝimo, estas suspektata kaj minacata. Oni ĉiam devas nevole subteni kaj enkonduki la faŝisman rekacion en la lernejon. Ankaŭ la ekonomia stato ne estas pli bona. Mi ne parolos jam pri la instruistoj el la t. n. naci-malplimultaj lernejoj, kiuj ne estas subtenataj de la registaro. Tie la instruisto simple malsatas. Mi havas multajn kolegojn, kiuj instruas en tiaj lernejoj. Ili ricevas la salajron nek en sama monato, nek en la dua, nek eĉ en la tria. Oni ĉiam ŝuldas al ili por 4—5 monatoj. La infero de la malsatego konstanta turmentas ilin kaj iliajn edzinojn kaj etulojn.

Mi asertas, ke en neniu kultura lando la instruistaro suferas politike kaj ekonomie, kiel en Polio. Mi mem ekzemple instruis 9 jarojn en diversaj popollernejoj kaj vesperkursoj. La salajro estis sufiĉa nur por ne morti... Tiel mi instruis kaj malsategis ege, ĝis — mi malsaniĝis danĝere. Per malmultaj groŝoj, prunteprenitaj de mia familio (laborista), mi veturis kuracejon. Elirante el sanigejo kaj ree malsatante, mi denove malsaniĝis. Post la resaniĝo, mi jam restis absolute senlabora, ĉar la kuracistoj malpermesis al mi labori. Dume, mi havas hazarde 2—3 lecionojn privatajn. En lernejo, mi ne plu povas instrui por ne plimalbonigi la sanstaton. Mi jam sentas, ke proksimtempe mi ree estos senlabora. Nu, kio poste? Ree malsano, sekvata de malsanoj ktp....

Kaj sciu, ke mi ne estas tia unusola. Tio estas la efektiva reala vivostato de miloj kaj miloj de geinstruistoj en Polio. Kion fari? Dronas ni en mondo de turmentoj neeltenеblaj. M. G. (10099).

Fabeloj de Herm. Zur Mühlen (kontrolita de malnova Liter. Komisiono en Leipzig).

La Laborista Esperantismo de Lanti (ne kontrolita de Liter. Komis.).

Ĥodinka de Tolstoj (n e kontrolita de Literat. Komisiono).

Necesas diri, ke nia plano, publikigita en "S-ulo" n-o 191 estas plenumita ne sufiĉe bone. Nur d u libroj estas presitaj laŭ nia plano; ceteraj ses libroj, kiuj aperis en la daŭro de la jaro, estas eksterplanaj.

Ni posedas jenajn manuskriptojn[1]:

1. Kosmopolita Ideo de Hartvig (baldaŭ presota).
2. Ford aŭ Marks de J. Walcher (kontrolita).
3. Rakontoj pri Kamparo (el ukraina literaturo) (kontrolita).
4. Kiel homo formis sian dion, de E. Simmel (kontrolita).
5. Skizo pri ekonomia geografio de Horrabin (kontrolita).
6. Zamenhof de Drezen (baldaŭ presota).

Nia konkurso pri utopia romano (originala) ne donis pozitivajn rezultojn: venis nur kvin proponoj (el ili nur tri detalaj); sed neniu kontentigis la kondiĉojn.

Do anstataŭ originala utopiaĵo Liter. Komisiono insistis pri eldono de la tradukaĵo: Ruĝa Stelo de Bogdanov, nun presata.

Dum la lasta jaro la Komisiono ekzamenis vicon da manuskriptoj, kiujn ĝi trovis ne taŭgaj, ne pro lingvaj mankoj, sed pro la enhavo. Necesas, ke ĉiuj tradukistoj aŭ original-verkistoj, antaŭ ol entrepreni iun verkon, sin turnu al Liter. Komisiono skizinte la projektatan laboron. Tiel oni povas eviti senutilan perdon de tempo kaj de fortoj ĉe multaj niaj verkistoj. Jam kelkaj K-doj faris antaŭan interkonsenton kun Liter. Komis. pri verkoto.

Por la Kongreso ni havas jenan proponon: "Literatur - Komisiono" de SAT, kiel ĉiuj ceteraj labor-organoj de Direkcio, devas troviĝi en unu loko, t. e., ĉiuj membroj de Literatur. Komisiono devas loĝi en la sama urbo. Tion ni proponas, havante sperton de trijara laboro. Nia propono ne signifas, ke Liter. Komisiono izoliĝu en unu urbo. Ĝi devas havi kontakton kun la tuta mondo, donante difinitajn taskojn al diversurbaj K-doj (laŭ sia elekto kaj laŭ proponoj de koncernaj K-doj). Sed la tutan respondecon pri la afero devas havi Literatur-Komisiono — unuurba labor-kolektivo (same kiel redakcio de "S-ulo" estas unuurba aparato).

[1] Krome la Asocio posedas jenajn manuskriptojn de Tolstoj-verkoj: La sola rimedo (28 p.), Kristanismo k Patriotismo (89 p.), Pripensu (88 p.), Pri ŝtatpotenco (30 p.), Restarigo de infero (28 p.), Ĉu vere tiel estas necese (40 p.), Leĝo de Perforto k Leĝo de Amo (120 p.). — Tiuj manuskriptoj estas sendotaj al la Literatura Komisiono. Ankaŭ la manuskripto de Jak London, "La Fera Kalkanumo" (trad. de Saville, kontrolita de antaŭa Lit. Kom.) troviĝas je nia dispono.

Dir. de SAT.

## FILATELISMO, BAGATELISMO KAJ LAB. ESP. PROPAGANDO

Ofte ni renkontas kontraŭulojn de esp-o. Eĉ en Sovetio ni renkontas ilin, kaj tial mi persone kelkfoje tre malfacile propagandis kun sukceso. Por klarigi ilian opinion pri esp-o, mi volas priskribi kontraŭdirojn, kiujn mi aŭdis de tre estimata K-do, kunlaboranto en sovetia gazetaro.

"Mi konas esp-iston, kiu al mi diris pri via internacia lab. kunligo: En viaj gazetoj vi ĉiam povas trovi anoncojn pri interŝanĝo per PM, PI ktp. Filatelistajn anoncojn oni trovas amase. Vere, esp-o estas bonega interligilo por poŝtmarka, poŝtkarta interŝanĝo. Oni ankaŭ povas trovi div. anoncojn pri aktuala geedziĝo ktp. Estas tre bona afero serĉi por si edzinon belan kun difinitaj ecoj en la tuta mondo. Kaj tre interesa korespondado estas — poŝtkartoj, sur kiuj estas skribite: Mi sendas novjar-saluton. Kaj rilate al vera internacia lab. kunligo, jen mi vidis salutleterojn, sur kiuj estis skribite: 'ni sendas al vi nian flaman saluton okaze de la...' kun subskriboj. Ĝi montras nur, ke vi petis alilandulojn plenumi vian deziron kaj ili laŭ mendo plenumis tiun taskon. Sed tio ne montras veran intern. lab. kunligon. Ĝenerale bagatelaĵo..." ktp. ktp.

Kion do mi devis respondi al li? Ĉu vi opinias, ke mi konsentis kaj estis venkita? Ĉu li estis prava — pri tio iom pripensu SAT-anaro?!

Feliĉe mi venkis. Nuntempe la K-do alimaniere pensas pri la lab. esp. movado. Kaj mi rakontu miajn klarigojn pri la tuŝitaj demandoj. Filatelismo — certe bagatelo, stultaĵo. En nia organizo ni jam komencis batalon kontraŭ ĝi. En nia gazetaro ni rekomendas interŝanĝon per ĵurnaloj, fotoj pri lab. vivo kune kun priskribaj leteroj. Ni batalas, ke esp. lab. korespondado estu vere unuiganta laboristojn. Mi tuj montris al li kelkajn leterojn kaj fotojn, gazetojn. Li estis interesita. Kiam mi montris al li libreton "Stalin, Pri Lenin" en esp-o kaj diris, ke nia "labkor-o" plenumis tiun eldonon kaj sendas ĝin al siaj korespondantoj — li estis kontentega. Filatelismo, mi diris, en nia lab. esp. rondego iom post iom malaperas, kaj ni fine ĝin tute malaperigos. Pri laŭanonca edziĝo mi klarigis, ke tio estis tute okaza anonco kaj esp-o por la proletaro certe ne estas bagatelo, sed vera batalilo en ĝia klasbatalo. Kaj mi povis montri al li leteron, en kiu K-doj tre interese priskribis sian batalon kaj vivkondiĉojn. Por ili ne la subskriboj kaj stampoj estis la gravaĵo, sed la enhavo. Post longa konversacio mi konvinkis lin kaj mi pensas, ke la K-do ne plu akuzos nin pro diversaj bagateloj. Mi esperas, ke ne; sed tio dependas de la SAT-anaro, kiu devas ĉiutage kontraŭbatali la ŝtultaĵojn.

P. Tilin (9310), Leningrad.

Jus aperis kiel 8-a volumeto de "Biblioteko de Sennaciulo"

**Leo Tolstoj**

**ĤODINKA**

Du rakontoj de la fama verkisto, ilustritaj per reproduktoj de artpentraĵoj. Kun enkonduka artikolo de K-do N. Modenov kaj skizo de Akademiano V. Friĉe pri L. Tolstoj kiel moralisto.

64 pĝ. Prezo: **0.60** mk. g.

**Administracio de SAT, Colmstrasse 1, Leipzig O 27. En Sovetio: CK de SEU, Poŝtkesto 630, Moskvo.**



## 9-a Kongreso de SAT

**en Leipzig (Germ.) 4.—10. aŭg. 1929**

### 11-a Komuniko

**Aliĝoj** por partopreno ĉe la 9-a SAT-Kongreso imageble plejparte okazos nur en la lastaj semajnoj antaŭ kongreskomenco. Ni refoje avertas, senprokraste kongresaliĝi, ĉar nur tiel la K. K. kapablos orde aranĝi ĉiujn aferojn.

**Kongresafiŝoj kontraŭ afranko** estos sendataj, por eviti ke la afiŝoj makulaturiĝos. Laŭ deziro de multaj Gek-doj la K. K. presigis pli grandan kvanton da kongresafiŝoj, sed nun ili kuŝas ĉe nia administranto. Tuj mendu pli grandan kvanton, sendante la sumon aŭ poŝtmarkojn por afranko: 6 afiŝoj 0.25 mk., 14 afiŝoj 0.50 mk.

**Atentu!** La kongresinsigno montrita lastaj n-oj de "S-ulo" nur estos liverata al kongresaliĝintoj. Por liveri al la Gek-doj plej valoran memoraĵon, la insigno ne aperos en metalo, sed eĉ estos brodita kvinkolore (laŭ publikigita skizo). Rekompencu niajn penojn per amasa aliĝo!

**La kongreslibro,** ampleksanta 48 paĝojn, kune kun la insigno estos liverata al ĉiuj kongresaliĝintoj (kiuj ne povos veni al la Kongreso, tuj post ĝia finiĝo ricevos ĝin per poŝto). La libro estas belilustrita.

Pri ilustritaj poŝtkartoj, kiuj plej facile disvendiĝas, sigelmarkoj, da kiuj la K. K. ankoraŭ havas provizon, legu en antaŭaj Komunikoj de la K. K. k senprokraste mendu...

**Mendojn k aliĝojn** sendu al K-do W. Kampfrad, Löbauer Str. 35, Leipzig N 24 (Germanio).

**Monon** por mendoj k aliĝoj sendu aŭ en monbiletoj al K-do W. Kampfrad, aŭ per adm. de SAT aŭ ties poŝtĉekaj kontoj. — Germanianoj nepre uzu poŝtĉekon: W. Kampfrad, poŝtĉeka konto 13 527, Leipzig.

**Antaŭkongresaj renkontiĝoj — postkongresaj ekskursoj.** La Gek-doj verŝajne ĝis nun ne sufiĉe atentis tiujn aranĝojn, pro kio ni presigas apartan alvokon k petas, nepre legi ĝin.

**Liberpensula fakkunsido.** Dum la fakkunsido de l' liberpensuloj (ateistoj, sendiuloj ktp.), kiu okazos la 7-an de aŭgusto, je 19-a h., parolados K-do prof. Hartwig (la oficiala delegito de la "Internacio de proletaj liberpensuloj") pri: "Esperanto en la servo de la liber-

pensula movado.“ Ĉiu liberpensulo do nepre partoprenu tiun fakkunsidon.

**Radio-disaŭdigoj.** Atentu! La ondlongo de la radio-sendstacio Leipzig estas ŝanĝita; nuna ondolongo estas: 1157 kc/s 259 metroj. Disaŭdigotaj estos: vendredon, la 12-an de julio, je 18.05-a ĝis 18.20-a horo raporto donita de s-ro d-ro Dietterle pri la preparaj laboroj por la 9-a SAT-Kongreso; la 5-an ĝis 8-an de aŭgusto ĉiuvespere je 22-a ĝis 22.10-a horo raportoj en esp-o pri la kongreslaboroj; mardon, la 6-an de aŭgusto, je 17-a horo parolado de K-do Drezen-Moskvo pri “moderna sociologia lingvoscienco kaj mondlingvo“, farota en la kongresejo. Nepre aŭskultu k skribe informu la sendstacion “MIRAG“, Markt 8, Leipzig, pri la aŭdebleco, ĉar tio samtempe plifaciligos enkondukon de esp-o.

**Pasporton** bezonos ĉiu kongresonto, kiu ne loĝas en Germanio. Germana vizo necesiĝas por ĉiuj landoj, escepte jenaj: Aŭstrio, Britio kun Irlando, Ĉeĥoslovakio, Dancigo, Danio, Finnlando, Hispanio, Islando, Italio, Jugoslavio, Latvio, Liĥtenŝtajn, Luksemburgo, Nederlando, Norvegio, Portugalio, Svedio, Svisio. Estas plej urĝa tempo, ordigi pasport- k vizaferon.

**Ekspozmaterialon** senprokraste sendu al K-do Fr. Emmrich, Fichtestr. 102, Leipzig S 3. Sendu nur plej taŭgan, sed provu, nepre ion sendi, ĉar nur tiel ni povos aranĝi ĝin efike. La materialo estos konservata por postaj kongresoj . . .

**Sovetianoj neniel povos ŝanĝi sian monon en Germanio.** Nepre ŝanĝu viajn monbiletojn antaŭ forlaso de Sovetio, aŭ ĉe ŝtata banko, aŭ ĉe la limo.

**Informpetojn,** mendojn al invitleteroj ktp. adresu al K-do F. C. Richter, Lochmannstr. 2/3, Leipzig O 27 (Germanio).

**La devizo por ĉiu estu: Al la 9-a SAT-Kongreso en Leipzig!**

---

### 14-a listo de aliĝintoj

663 Rich. Bach, Wiedersdorf, Germ. 13 430
664 J. Rindler, Los Angeles, Usono . 10 319
665 Marg. Oppelt, Meissen, Germ. . 8 205
666 Marie Sampson, Torquay, Anglio 14 274
667 J. Suarez, Puerto de la Luz, Hispanio . . . . . . . . . . 13 960
668 Frank, Perm, Sovetio . . . . 2 144
669 Ernst Liebig, Bielefeld, Germ. . 5 838
670 Paul Lembke, Ulm, Germ. . . . 14 205
671 Walter Braun, Leipzig . . . . 7 546
672 Erich Endler, Berlin . . . . . 6 523
673 Georg Gammel, Regensburg . . 7 589
674 Alfred Lehmann, Berlin . . . . 13 811
675 Otto Elsner, Dittersbach, Germ. . 4 144
676 Wilhelm List, Ottendorf, Germ. . 4 681
677 Hungario . . . . . . . .
678 Erich Zinke, Radeberg, Germ. . 11 408
679 Tore Anderson, Göteborg, Svedio 13 322
680 Luka Marković, Sarajevo, Jugosl. 13 535
681 Stefo Kirchhoffer, Brod, Jugosl. . 10 159
682 Eugenio Aresti, Bilbao, Hispanio 2 759
683 Nikolao Koŝelev, Ŝostka, Sovetio 6 935
684 H. Vogel, Riesa-Gröbers, Germ. 14 874
685 Josef Dressel, Hersbruk, Germ. . 13 451
686 Johann Ruder, Hohenstadt, Germ. 14 875
687 G. Birkmann, Hohenstadt, Germ. 13 096
688 Mikaelo Segal, Saratov, Sovetio 127
689 Albin Altwein, Leipzig . . . . 4 266
690 Sergio Pelevin, Vologda, Sovetio 7 963
691 Petro Prohorĉik, Minsk, Sovetio 4 430
692 Franz Linke, Rositz, Germanio . 10 804
693 D. Izvekov, Sverdlovsk, Sovetio 9 181
694 Gust. Geisler, Hirschfelde, Germ. 7 383
695 E. G. Manning, Manchester, Angl. 6 833
696 Marie v. Essen, Marken-Binnen, Nederlando . . . . . . . . 10 278
697 Konrad Poerper, Herford, Germ. 14 078
698 Ernst Meier, Halle, Germanio . . 14 887
699 Ottokar Hanonsek, Halle . . . 14 367
700 Kurt Schubert, Halle . . . . . 14 888
701 Herbert Fantasny, Halle . . . 7 862
702 Adolf Horn, Augsburg . . . . 6 972
703 Wilh. Krisa, Stadtbergen, Germ. 6 973
704 Thomas Kopp, Augsburg . . . 14 895
705 Josef Burger, Essen, Germanio . 601
706 Josef Burger jun., Essen, Germ. . 4 548
707 Walter Rottmann, Herford, Germ. 14 077
708 Fritz Strömer, Herford, Germ. . 14 080
709 Theodor Sauermann, Hiddenhausen, Germanio . . . . . 14 079

### Donacoj

Braun-Leipzig 1.— mk. g.; List-Ottendorf 1.— mk. g.; Zinke-Radeberg 2.— mk. g.; van Essen-Marken-Binnen 2.— mk. g.; Horvat-Vulkovar 0.70 mk. g.; Wiener-Katowice 4.80 mk. g.; Surek-Berlin 1.— mk. g.

---

## ANTAŬKONGRESAJ RENKONTIĜOJ

Kvankam ni sufiĉe frue alvokis por partopreno ĉe antaŭkongresaj renkontiĝoj k petis anonci tion ĉe koncernaj organizantoj, ĝis nun nur malmultaj Gek-doj plenumis tiun peton. Nepre partoprenu antaŭkongresan renkontiĝon, ĉar poste por karavana veturo de koncerna loko al Leipzig vi ĝuos fervojan rabaton de 25%.

**Breslau** (por orientaj k sudaj regionoj). Organizanto: Willy Thielking, Vorwerkstr. 62, Breslau. Forveturo al Leipzig: dimanĉon je 6.04-a horo. Alveno en Leipzig: dimanĉon je 12.31-a h. Veturprezo: 14.70 mk. g. (rabatita je societa veturo).

**Düsseldorf** (por okcidentaj k nordokcidentaj regionoj). Organizanto: Georg Buna, Gerresheimer Str. 20, Düsseldorf. Forveturo al Leipzig: sabaton je 22.18-a horo. Alveno en Leipzig: dimanĉon je 8.50-a h. Veturprezo: 18.50 mk. g. (rabatita je societa veturo).

**Regensburg** (por sudaj k sudorientaj regionoj). Organizanto: Johann Alzinger, Hauptstr. 16/2, Regensburg-Stadtamhof. Forveturo al Leipzig: sabaton je 9.39-a h. Alveno en Leipzig: sabaton je 15.55-a h. Veturprezo: 14.10 mk. g. (rabatita je societa veturo).

**Rostock** (por nordaj k nordorientaj regionoj). Organizanto: Rudi Graetz, Waldemarstr. 17, Rostock. Forveturo al Leipzig: sabaton je 21.34-a h. Alveno en Leipzig: dimanĉon je 8.45-a h. Veturprezo: 9.50 mk. g. (rabatita je societa veturo).

---

## POSTKONGRESAJ EKSKURSOJ

Pri la postkongresaj ekskursoj jam multo estis skribita en “S-ulo“, sed malmultaj Gek-doj anoncis sin por partopreno. Faciligu al la organizantoj de tiuj postkongresaj ekskursoj la bonaranĝon, tuj anoncante vin por partopreno. Dum la Kongreso okazos neniaj ekskursoj; la ekskursoj okazos nur post finiĝo de la praktika laboro. Atentu la ŝanĝon de forveturo de Leipzig, kiu estas pli favora ol la antaŭa:

**“Saksa Svisio“** (Sächsische Schweiz). Organizanto: Paul Köckeritz, Tharandter Str. 6, Dresden-A. 28. Forveturo de Leipzig: vendredon je 14.10-a h. Alveno en Dresden: vendredon je 16.10-a h. Veturprezo: 4.90 mk. g. (rabatita je societa veturo). Renkontiĝo: je 13.30-a h. en ĉefstacidomo de Leipzig.

**Saksa metalmontaro** (Sächs. Erzgebirge). Organizanto: Willy Richter, Innere Bergstr. 8, Thalheim en Erzgeb. Forveturo de Leipzig: vendredon je 14.29-a h. Alveno en Thalheim: vendredon je 19.15-a h. Veturprezo: 3.10 mk. g. (rabatita je societa veturo). Renkontiĝo: je 13.45-a h. en ĉefstacidomo de Leipzig.

**Mezgermania industriregiono** (Mitteldeutsches Industriegebiet). Organizanto: Otto Schiepe, Talstr. 12, Ammendorf ap. Halle. Forveturo de Leipzig: vendredon je 14.40-a h. Alveno en Halle: vendredon je 15.35-a h. (tie tranoktado). Veturprezo: 1.15 mk. g. (rabatita je societa veturo). Renkontiĝo: je 14-a h. en ĉefstacidomo de Leipzig.

**Turingio** (Thüringen). Organizanto: W. Semmler, Moritz-Seebeck-Str. 2, Jena (Thür.). Forveturo de Leipzig: vendredon je 13.43-a h. Alveno en Jena: 18.08-a h. Veturprezo: 2.70 mk. (rabatita je societa veturo). Renkontiĝo: je 13-a horo en la ĉefstacidomo de Leipzig.

---

## POSTKONGRESA EKSKURSO AL “SAKSA SVISIO“

Ĉar la 9-a SAT-Kongreso oficiale jam finiĝos la 8-an de aŭgusto, la karavano al “Saksa Svisio“ forveturos ne sabaton, sed jam vendredon, la 9-an de aŭgusto for de Leipzig. Nia plano publikigita en la 8-a Komuniko de la K. K. (n-o 243 de “S-ulo“) ŝanĝiĝas jene: vendredon-sabaton tranoktado en Dresden; sabaton forveturo al “Saksa Svisio“, tranoktado en Sebnitz; dimanĉon denove al “Saksa Svisio“, tranoktado en naturamika hejmo; lundon ekskurso en “Saksa Svisio“, tranoktado en Dresden. — La Gek-doj partoprenontaj senprokraste anoncu sin ĉe K-do: Paul Köckeritz, Tharandter Str. 6, Dresden-A. 28 (Germanio).

---

## FERVOJISTOJ — KONGRESONTOJ

Krom la fakkunsido de la trafiklaboristoj (fervojo, poŝto, tramo k. a.), kiu okazos lundon, la loka estraro de la Fervojista Sindikato aranĝos mardon, la 6-an de aŭgusto, je 20-a horo PUBLIKAN FERVOJISTAN KUNVENON kun jena tagordo: 1. laborkondiĉoj de la germanaj fervojistoj antaŭ k post la milito; 2. la labormaniero de la diversaj kategorioj ĉe la fervojo; 3. diversaĵoj. — Ĉiuj fervojistoj partoprenontaj la 9-an SAT-Kongreson, senprokraste anoncu sin ĉe K-do Max Häckel, Altenburger Str. 18, II, Leipzig S 3. Preparu vin por raporti pri laborkondiĉoj de la fervojistoj en via lando, ĉar tiel ni plej trafe povos pruvi la valoron de esp-o por la internacia trafiko.

---

**Per legado vi lernas . . . Legu regule . . . Abonu la semajnan legaĵon — “S-ulo“!**

## Al la gekongresontoj!

Post kelkaj semajnoj la publiko parolas en Germanio pri nia renkontiĝo en Leipzig okaze de la 9-a SAT-Kongreso. Pli ol 600 K-doj jam kongresaliĝis laŭ la publikigitaj listoj. Ĉio estas preparita por akcepti la gekongresanojn. Sed, vere, la informoj pri aliĝoj al la antaŭkongresoj tute ne povas kontentigi la organizantojn. Tial mi uzas la okazon por denove atentigi la Gek-dojn veturontajn al Leipzig el okcidenteŭropaj regionoj k el la nord-okcidento, pasi tra Düsseldorf k halti tie almenaŭ unu tagon. Düsseldorf, lokita ĉe la bordoj de l' riverego Rejno, prezentas al la vizitanto multajn allogojn, multon belan k vidindan. Komerco k industrio ludas distingan rolon. Ni vizitos laŭeble ĉion vidindan, precipe la kooperativajn produktejojn. En la popoldomo okazos internacia amaskunveno la 2-an de aŭgusto (vespere). La forveturo al Leipzig okazos kolektive sabaton vespere (3-an) je la 22.18 h. Multaj Gek-doj el tuta Rejnlando-Vestfalio certe ĉeestos nian antaŭkongreson. La germanlingvaj K-doj volonte parolus kun vi, ĉar granda parto ja ne havas la rimedojn por partopreni la 9-an. Estu solidaraj k aliĝu al la kongreso! Pri senpaga loĝado k manĝado estos zorgate. Kiu scipovas oratori dum la antaŭkongreso, informu nin speciale. Skribu multnombre, bone legeble al K-do Georg Buna, Düsseldorf, Gerresheimer Str. 20, I.


DÜSSELDORF. — Vido sur la Rejnon.


DÜSSELDORF. — Honora korto kun Rejn-halo.

### Por la 9-a SAT-Kongreso

**Sigelmarkoj:** 60 ekz. (1 folio) 0.50 mk. g.
**Leterfolioj kun kovertoj:** 15 ekz. 0.50 mk. g.
Tuj mendu ĉe: W. Kampfrad, Löbauer Str. 35, Leipzig N 24 aŭ ĉe Adm. de SAT.

## Proponoj al la 9-a Kongreso

(Daŭrigo)

15.

Mi proponas starigon de "Kinoteatra paĝo" ĉe "S-ulo". Motivigo: Multaj K-doj jam skribis en "S-ulo" pri neceso de tia paĝo, sed ĝis nun nenio estas farita. Tial la Kongreso okupu sin pri la afero. Mi povus preni sur min la redaktoran laboron, se neniu alia K-do troviĝas preta. (7349), Moskvo.

16.

Konsiderante unuflanke, ke la seksa demando estas treege eduka temo, due ĝis nun la polemikoj en "S-ulo" pri tiu demando nur konfuzis la problemon, mi proponas en ĉiuj n-oj de "S-ulo" k laŭeble "La Lernanto" rezervi lokon por presi materialon (ĉu originalan aŭ tradukan) pri seksdemandoj; laŭeble ankaŭ presigi broŝuron pritraktanta la problemon, konigi instruajn, kompreneblajn nacilingvajn verkojn pri seksa proletedukado, eventuale aperigi skemojn, bildojn aŭ fotojn pri tiu demando. SAT-ano 9344.

17.

Ĉar estas vera malhelpo por la ĝenerala SAT-agado, ke nur de jaro al jaro, okaze de la ricevo de l' jarlibro, la anoj neabonantaj la oficialajn organojn sciiĝas pri la ekzisto de la Asocio, tial la "Valencia SAT-anaro" proponas: La SAT-Direkcio eldonu trimonate kroman oficialan eldonaĵeton, kies titolo povus esti "SAT-Bulteno". Ricevu ĝin ĉiu aktiva SAT-ano pere de la loka peranto. La gazeteto enhavu nur skize ĉion diskonindan por la tuta membraro. Amplekso k formato estu modesta, kiel "La Lernanto".

Se la nuna ekonomia stato de SAT ne estas favora por fari tian plian elspezon, ni ankaŭ proponas, ke ĉe la kvar aperfojoj pojare de tiu Bulteno "S-ulo" estu 8-paĝa, ĉar ni opinias, ke oni devas oferi iom el la privataj rajtoj por la komuna k ĝenerala pliboniĝo.

Je la nomo de la ceteraj anoj —
Luis Hermandez (12916).

**Socialistaj Gek-doj** el tuta mondo sendu salutleterojn al K-do Mermet, 56, rue du Pré, Saint-Claude (Jura, Francio) okaze de la Studsemajno aranĝota en tiu urbo de la Franca Socialista Junularo dum 22.—28. julio. Oni memoru, ke la Soc. Junularo de la Sen-departemento jam rezoluciis favore por esp-o. Leteroj esp-aj al tiu aranĝo certe havos bonan propagandan efikon.

* * *

**Barcelono.** Okaze de la Barcelona Internacia Ekspozicio estas starigita Esperantista Renkontejo en strato Durany Bas 8, pral., funkcianta ĉiujn labortagojn de 18-a ĝis 20-a h. vespere, por akcepti k informi esp-istojn. Presaĵoj k propagandiloj estas elmetataj.

## I-A INTERNACIA FESTO DE LAB. MANDOLINISTOJ EN LEIPZIG

La 13.—15. de julio 1929 renkontiĝas proks. 3000 lab. mandolinistoj en Leipzig, por festi la unuan internacian feston de lab. mandolinistoj el ĉiuj landoj. Multnombraj anoncoj jam okazis. Germanoj, aŭstroj, holandanoj, svisoj, francoj kaj ĉeĥoj fondos en Leipzig la "Sonantan Internacion". Per manifestacio, per amasludo sur la Placo de Aŭgusto, en grandaj artplenaj koncertoj la lab. mandolinistoj demonstros siajn kulturajn k proletajn celojn. La ondoj de la mezgermana radiosendilo disvastigos la koncertojn en ĉiujn landojn.

Gek-doj esp-istoj! Subtenu nian feston. Atentigu amikojn de niaj instrumentoj. Aliĝu al nia movado. Ĉiuj simpatiantoj, precipe kordinstrumentulaj unuiĝoj k kluboj skribu salutleterojn, por ke ni povu diri al la festpartoprenantoj, kiom disvastigita estas la granda anaro da lab. mandolinistoj. Ĉion por la ideo! Ĉion por la proletaro! Sendaĵojn direktu al: Gazet- k Propagandkomisiono Konrad Fischer, Schwägrichenstr. 13, Leipzig C 1, Germanio.



## RECENZEJO

Duope ricevitajn verkojn ni recenzas, unuope ricevitajn ni nur mencias.

**Varankin V., Teorio de Esperanto.** Helpilo por superaj esperanto-kursoj. Eld. CK SEU — Moskvo, 1929. Pĝ. 67, Form. 15×23 cm. Prezo nemontrita.

Ni ne konsentas kun la opinio de L. K. SEU, kiu en la antaŭparolo diras, ke gramatikoj "estas tute ne bezonaj por la vasta esp-istaro". Ĝi plie opinias, ke "esp-o estas lingvo science konstruita k nome pro tio ĝi estas tiom simpla k facile lernebla". Ni opinias iom alie k povus facile pruvi ne nur per redakcioj de esp-aj ĵurnaloj, sed eĉ per simplaj interkorespondantoj, ke 90% de la esp-istaro — spite la facileco de la lingvo — ne scias ĝin (ni ne diru elegante), sed simple korekte skribi.

Ni tamen konsentas kun L. K. SEU, ke libroj, similaj al tiu de V., estas ĝenerale tute ne bezonaj por la esp-a publiko.

Interesa estas la Enkonduko en la teorion, kvankam ne ĉio estas akceptebla. Ofte ni povus jen ion aldoni, jen ion forstreki ĉu eĉ tute ŝanĝi. Ekz. al frazo "La lingvo evoluis el diseco al unueco" ni certe aldonus — k de unueco al diseco. Tio estas ja socia fenomeno facile pruvebla.

Ni lasu tamen la teorian parton. La plej danĝera eĉ malutila, se la libro pretendus esti instrulibro — ŝajnas al ni ĉefe la Fonetiko, en kiu K-do V. tion facilanime elŝimas la teoriemon de Moch (kial ne Mok?) pri silabigo, pri "fermitaj" k "malfermitaj" vokaloj (tute malĝuste tiel nomataj!) k. s. Ni kun plezuro volus aŭdi paroli, deklami laŭ tia silabigo: la-bor-ist-in-o, est-ing-iĝ-is!! Cetere K-do V. ŝanĝas sian opinion en la § 32, kie li konsilas elparoli laŭ Zamenhof pan-jo (k ne pa -nj -o). Laŭ ni oni povas

tute bone elparoli ek-za-me-no (eĉ subte-ni) k nepre ne devas diri: eĝzameno, supteni, kvankam ni scias, ke oni ĝenerale tiel elparolas. Cetere, ke **ks** k **kz** troviĝas en vortoj devenaj el latina, greka ĉu alia lingvo, kiu skribas ĝin per **x**, tio havas grafikan signifon, sed ne fonetikan. La progresema aŭtoro erare opinias, ke **c = ts**; tiu lasta sono estas tamen io alia. Ankaŭ lia opinio, ke oni emas paroli anst. aktoro = attoro, estas tute neĝusta, ni volonte povas pruvi ankaŭ la kontraŭan evoluon en multaj lingvoj.

La ordigo de afiksoj ne ŝajnas al mi pli klara ol ekz. ĉe Fruictier.

Laŭ la aŭtoro (§ 56) ekz. La sinjoro estas vidva signifus La sinjoro apartenas al vidvo; al ni ŝajnas, ke la sinjoro apartenas al — neniu k pro tio li estas vidva.

La lingvo de K-do V. estas bona, k ni nur bedaŭras trovi la uzon de: maso, demonstracio, rezistanco, analitiko, sintetiko, koresponda, guverni, plenŝtona, riĉŝtona ktp. anstataŭ amaso, manifestacio, rezisto, analizo, sintaksa-sinteza (?), responda, regi, ŝtonplena, ŝtonriĉa ktp.

Ni povas la libron rekomendi al ĉiu teoriulo; sed kiel lernolibro ĝi ŝajnas al ni ne akceptebla[1].

S. Grenkamp.

[1] *Kompreneble la recenzinto portas la tutan respondecon pri sia kritiko. Ni tamen devas aldone protesti kontraŭ la eldono de tiu verko fare de SEU. Tio estas rompo en la konvencio unuanime akceptita en Göteborg. Tial ke la verko de K-do Varankin estas uzebla en la tuta mondo, ĝin devus eldoni SAT. Ĉiu, kiu legis la tekston de la konvencio, kiun ankaŭ akceptis la reprezentanto de SEU en Göteborg, ne povas havi plej etan dubon pri tio. Nia protesto estas do ĉiurilate fundamentita.*

Direkcio de SAT.

## KOREKTOJ

En n-o 247 troviĝas diversaj preseraroj. Ni korektas nur la plej gravajn. Legu fruntpaĝe, dua kolono, unua linio 5% (anst. 5½), 3-a kol., lin. 20 de supre "ol" (anst. "el"), pĝ. 383, 3-a kol., lin. 12 de malsupre "subaĉetante" (anst. subĉatante), pĝ. 390, 2-a kol., lin. 2 de malsupre "Ilo" (anst. Ho). Sur pĝ. 386, 3-a kol., lasta linio, legu "latunojn" (anst. "la barelojn"). Ni konstatas rilate al tiu malkorektaĵo, ke ĝi **ne** troviĝis en nia manuskripto, sed ke kompostisto aŭ korektisto arbitre ŝanĝis tiun vorton, fuŝante nian red. aferon! Red.

## Nekrologo

12-an de junio mortis post mallonga suferiga malsano

**K-do JOHANO DYŜKOVSKIJ**
(10 663)

Estante mem popol-instruisto, li bone komprenis utilon de internacia lingvo por la laboristaro k, kvankam tre ŝarĝite per partia k socia laboro, li trovis tempon ankaŭ por esp-o, gvidante SEU-ĉelon en Smolensk. Nian profundan kondolencon al lia familio.

**Smolenska SAT-rondo.**

## NIA POŜTO

**7987.** — Certe vi prave postulas, ke verkistoj piednote klarigu en siaj verkoj neologismojn (neoficialajn vortojn). Ankaŭ la aŭtoro de "Prozo Ridetanta", el kiu verko vi eltiris la sekvantajn vortojn, devus fari tion. Jen la klarigoj: Beata = proks.: feliĉega; pie ravita sakra = sankta, amatest' = am-atest' (!), bolido = arda aerolito (astr.), sino = subbrusta virina korpoparto, ankaŭ metafore uzata, neglekti = malzorgi, langvoro = sopiro, aŭdaci = kuraĝegi, furzi = ellasi gasojn el la intesto. Pri la neceso de kelkaj el tiuj vortoj oni povas dubi. N. B.

**Radliv.** — Atentu pri uzo de l' akuzativo (ne apostrofebla), ĝenerale pri la gramatikaj reguloj! La du lastaj strofoj aspektas tre kriplaj. Sed ni ne volas malkuraĝigi vin en via verkado. Oni ne povas sukcesi tuj en la komenco.

**12 440.** — Ni notis vian skribon al "Jun. Sekcio". Reprez. de SAT ĉe la kunveno jam elektiĝis.

**5618.** — Via artik. estas sendita al Red. de TEPS (edukista servo).

**Studento.** — Via artik. sendita al Red. de "Scienc-Kult. Paĝo". Red.

**6707.** — Nekrologoj por membroj estas senpagaj, sed ni devas sendi ilin antaŭe al Paris.

**Novorossijsk.** — Ni kompreneble ne kulpas, se vi tiun aŭ tiun n-on ne ricevas. Sole kulpas la poŝto. Se ni kulpus, tiam vi neniun n-on ricevus.

**13 475.** — Ni ne kulpas, se vi 2 n-ojn ne ricevis, cetere ni ĝuste sendas. Adm.

# K·O·R·E·S·P·O·N·D·A·D·O

**Unu enpreso:** Simpla trilinia anonco kostas 0,50 mk. g., ĉiu plia linio la samon. Ni nur akceptas anoncojn kun samtempa pago.
L = letero, PK = poŝtkarto, PI = poŝtkartoj ilustritaj, PM = poŝtmarkoj, bfl. = poŝtmarko sur bildflanko, kĉl. = kun ĉiuj landoj, esp-aĵo = esperantaĵo.
**Ĉiuj petantoj pri korespondado havas la devon, nepre respondi almenaŭ unu fojon al ĉiuj petoj koncernantaj la fakon, por kiu ili sin enskribigis.**

### BELGIO

K-do Helman por Urlich (peltisto), 1. Place Betlehem, Bruxelles, dez. koresp. kun peltistoj, partoprenontaj la Lajpcigan Kongreson. Certe resp.

### ĈEĤOSLOVAKIO

K-do Jos. Gabriel, Holeischen Nr. 7, ap. Plzen, sendas al ĉiu 50 div. PM el Ĉ. S. R., se li ric. la saman kvanton de aliaj landoj. Sendu unue!

K-do Franz Hoffmann (tajloro), Neustadt a. d. Tafelfichte, Schlossergasse 41, dez. koresp. kĉl. pri politik. lab., kom. junul. temoj k ruĝa helpo, L, PK. Resp. garantiata.

### GERMANIO

K-do Kurt Spiegel, Uferstr. 37, I, Chemnitz, dez. koresp. kĉl. pri ĉ. temoj.

K-do Alfred Hirsch, Fichtestr. 13, Leipzig S 3, dez. koresp. kĉl. pri amatorfotografado.

K-do Bruno Madretzke, Berliner Str. 76, Breslau 3, dez. koresp. kĉl., L, PI, bfl. Resp. garantiata.

K-dino Johanna Schröter, Kasernenstr. 3, I, Zittau i. Sa., dez. koresp. kĉl. junularo pri junular-movado, L, PI. Certe resp.

K-do Reinhold Höhne, Freiheitstr. 67, Merkstein - Streiffeld, Kreis Aachen, dez. koresp. pri ĉ. temoj kĉl., L, PK, PI. Resp. garantiata.

**Gesportuloj,** vizitonte la olimpiadon en Vieno vi skribu al: "Sportklub 1900", Bleichrasen, Schweinfurt i. Bay.

— Kiu dez. kolektivan koresp-adon kun virina sekcio de sportklubo laborista? Tiu skribu al: "Sportklubo 1900", Bleichrasen, Schweinfurt i. Bay.

— Infan-rondeto de sportklubo laborista, dez. kolektivan k individuan koresp-adon. Skribu letere al: "Sportklubo 1900", Bleichrasen, Schweinfurt i. Bay. Resp. garantiata per la loka LEA-grupo.

**Adresŝanĝo.** — K-do Theodoro Dorn, Vordere Sterngasse 2, b. Müller, Mundenheim, Pfalz (antaŭe en Heidelberg).

K-dino Marie Frey, Hellspergstr. 1, Mühldorf a. I., dez. koresp. pri vivreformo, vivkondiĉoj k -kutimoj, liberpenseco, L, PI. Certe resp.

### HISPANIO

K-do Antonio Alberola (SAT 13 663), Colomer N-o 8, Valencia, dez. koresp. kĉl. gek-doj pri simplaj temoj k interŝ. i. gaz. L, PK, PI.

### SOVETIO

— Esp. rondeto ĉe Pskova Malliberejo dez. koresp. kĉl. pri ĉ. temoj. Adr.: Pskov, Postnikovskaja, 19, al K-dino Vronskaja.

K-do Boriso Mileŝkin, Ciganskaja, 31, kv. 4, Saratov (20 j.), dez. koresp. kĉl. pri div. temoj. Resp. garantiata.

— Pionir-taĉmento je la nomo de Buĥarin dez. koresp. kun geknaboj el ĉl. pri ĉ. temoj. Skribu multnombre al K-do B. A. Ejdmiller, Srednij prosp. 50, kv. 5, Rostov (Don). Ni ĉiam al ĉ. resp.

K-do N. Proskurin (lernanto), str. Gogoleva, 82, Barnaul, dez. koresp. kĉl., pri ĉ. temoj, L, PI, gaz., ĵurn. Certe resp.

K-do E. Jarovlev (j. lernanto), str. 2-a Projezd, 3, Barnaul (Sadgorod), dez. interŝ. L, PK, PI, kĉl. Certe resp.

K-do T. Aloŝin (30 j. kamparano), Loŝkarivska detkolonio, Nikopol, dez. koresp. pri agrikulturo k politiko.

**SOVETIO** (daŭrigo)

K-do P. Ĥozov (junlaboristo), str. Internacia, 198, Barnaul, dez. koresp. kun japanaj, amerikaj k francaj Gek-doj pri lab. vivo, L, PK. Resp. garantiata.

K-do Miĥajlov - Filippov, Gogolevskaja, 20, kv. 34, Jalta, Krimeo (invalido de milito), dez. koresp. kĉl., L, PK, PI, gaz.

K-do K. Gurov (studento-sportulo), Teĥnikum Fizkulturi, Stalingrad, dez. koresp. kĉl., L, PK, PI, sport-PI k sport-gaz. Resp. garantiata.

**SVEDIO**

Koresp-adon dez. knabinet-esp-istino Ingrid Anderson (10 j.), Poŝtkesto, 278, Karlsborg k. a. gelernantoj (10 ĝis 16 jaraj) en esp. rondeto. Adr.: Esperanto-Rondeto, Poŝtkesto, 202, Karlsborg.

**USONO**

K-do Peter S. Epifanovich, Box, 47, Internat. House, 500 Riverside Drive, New York, dez. koresp., L, PK, il. gaz.


**Anglа K-do**

kiu vendas sapon kaj kandelojn, deziras eltrovi germanan fabrikon, kiu mendos ilin por vendi la samon en Anglio. Ĉu estas germana K-do, kiu helpos eltrovi detalojn, prezon ktp.? Li sendu informojn laŭ mia adreso:

A. Sheldon, SAT-ano 4301,
11 Brentwood Ave, **Timperley**
Cheshire, Anglio.


**ATENTU, GELABKOROJ!**

Redaktejo de Nordlanda jurnalo **"Pravda Severa"**-Arĥangelsk, sur siaj paĝoj aperigas konstantan faketon- "Internacia korespondado" per esperanta materialo.

Peto al K-doj, kiuj volas fariĝi konstantaj korespondantoj de la jurnalo, aŭ simple helpi al ni: sendu artikolojn, leterojn kaj fotojn laŭ adreso de la Redaktejo aŭ peranto K-do **Erjuhin Aleksandro** (9682).

Tre dezirinde estas ricevi respondojn kaj adresojn de Segfabrikaj laboristaj ĉeloj en Svedio, Norvegio, Ameriko ktp. por interligiĝi kun niaj samspecaj lignajistaj organizoj.

La korespondado estas rekompencota laŭkonsente.

Gek-doj respondu kaj skribu multnombre!


**Radio-Informoj pri USSR**

ESPERANTLINGVAJ

de l'Ĥarkova stacio (potenco 12 kŭ. ĉe l' anteno, ondlongo 1680 m.) dum somera periodo estas transsendataj ĉiudimanĉe je la 22-a h. vespere de MET.

Peto al ĉiuj niaj aŭskultantoj informi nin pri aŭdebleco k kvalito de dissendoj laŭ adreso:

**Ĥarkov** (USSR), Radjanski majdan, Radiomovlennja.

**TUTUKRAINIA ADMINISTRACIO DE RADIOFONIO.**


**Por progresigo en esperanto** dez. koresp. kĉl pri ĉt L, PL, PK.

1. Rojencova (Kalkulistino) — Samara, Raboĉaja, 41, kv. 4.

2. Solovjev (teknikisto) — Samara, Nekrasovskaja, 48, kv. 2 — aparte pri laboro, moraro, tekniko, ankaŭ virina movado.

3. Fervojista SEU-ĉelo — Samara, Pravlenie S.-Zl. dor., al K-do Afanasjev (pri fervojistaj demandoj k ŝparkasoj).


**1000 edukistinoj**

el Ruĝa Franca Edukistaro deziras

**daŭran korespondon**

kun ĉiulandaj edukistinoj pri profesiaj, virinaj, sociaj temoj.

Esperanto-peranto:

**M. Boubou, 96, rue St. Marceau, Orléans (Loiret), Francio.**


**Rondeto** de intern. lab. interrilato ĉe invalida ruĝa anguleto de regiono "Krasnaja Presnja" de socia asekuro en Moskvo dez. koresp. kun ĉ. organizoj de militinvalidojpartoprenintoj de l' mond-milito pri div. demandoj. Resp. garantiata. — Sovetio Moskvo. 5-aja Tverskaja Jamskaja domo 3 Krasno-Presnenskii Raionnij Otdel Socialnago Obezpeĉenija V krujok mejrabsvjazi pri krasnom ugolke.

**PROLETA JUNULARO**

dez. koresp. individue k kolektive kĉl. pri ĉ. temoj. — Bonvolu amase skribi al: Naturamika junularo, Allerheiligenstr. 51, **Frankfurt a. M.** (Germanio).

**JUNULO 23-JARA**

tre deziras havi koresp., interŝanĝi L, PK, PI kun belaj fraŭlinoj el Ameriko kaj Italio. Adreso: Sovetio, **Sebastopolo**, str. 9-a januaro n-o 42, loĝ. 1. **Nikolao Barmin.**

**LABORISTAJ ESPERANTISTOJ**

dez. korespondi kun ĉiuj landoj k pri ĉiuj temoj. — Respondo garantiata.

Adr.: "Raboĉij Klub-Metallist", **Brjansk** (Sovetio).

**ATENTU, KOOPERATIVANOJ!**

Okaze de Internacia Tago Kooperativa 6.—7. julio oni aranĝas ekspozicion de kooperativaj gazetoj, jurnaloj, fotografajoj k aliaj koncernaj Kooperativaj. Eksterlandaj K-doj k ankaŭ K-doj el federaciaj k aŭtonomaj sovetaj respublikoj sendu nacilingvan materialon laŭ adreso: **Sovetio, Nijnja-Salda Tagilskogo okr., Uralo, al K-do Voroncov Sergej.** Al ĉiu sendinto reciproke estos sendataj gazetoj, PI, fotoj ktp.

**INDIVIDUE KAJ KOLEKTIVE!**

Sukceshava SEU-ĉelo ĉe Palaco-Klubo de fervojistoj en Dnepropetrovsk serĉas Gek-dojn el la tuta terglobo por interesplena k daŭra interkoresp. pri ĉiuj interesaj temoj. Interŝanĝas il. gaz., PK, L, fotojn ktp.

Do, atakegu nin multnombre, des pli, ke la loka SAT-Peranto K-do S. Kudrjavicki, konsentis zorgi pri akurateco de l' resp-ado.

Adr.: Klub Jeleznodorojnikov, Leninskaja ul., **Dnepropetrovsk**, "Esperanto"

**Foto-Kino-Societo "ODSK"**, Puŝkina str., Barnaul, dez. interŝ. spertojn, materialojn, fotojn kĉl. lab. foto-societoj, apartaj grupoj k individuoj. — Niaj kursanoj interŝ. fotojn, gaz. k jurnalojn. Resp. garantiata.

**SOVETIO**

Por sin perfektigi en Esperanto dez. koresp. kĉl pri ĉt L, PK, PI:

1. Ŝvejkus — Samara, Sovetskaja, 123, kv. 2 (32 j. komunisto, fervojista labkor-instruktoro) — aparte pri Socia laboro, labkor-a movado.

2. Malceva — Samara, Samarskaja, 76, kv. 4 (20 j. komjunulino fervojista) — aparte pri junularvivo k novajoj en tekniko.

3. Kazankov — Samara, Vokzal, Verĥnij telegraf, komn. 378 (19 j. komjunulo, elektroteknikisto).

4. Krasikov — Samara, Krasnoarmejskaja, 55, kv. 8 (teknikisto).

5. Dominikovskaja — Samara, Ĉapajevskaja, 160, kv. 5 (kalkulistino) kĉl, aparte kun Francio.

6. Andreev — Samara, Sadovaja, 261, kv. 8 (kalkulisto), nur pl.


*Leginda, nepre leginda estas*

***Trozo Ridetanta***

*Noveloj originale verkitaj de Raymond Schwartz.*

—o—

***Prezo: 3 mk. g. inkl. la sendkoston.***

*Havebla ĉe Administrejo de SAT.*



**Proverbaro Esperanta**

laŭ la verko "Frazeologio rusa-pola-franca-germana" de *M. F. Zamenhof*, aranĝis *L. L. Zamenhof*.

Unu volumo in-8, 82-paĝa

**Prezo: 1,50 mk. g.**

**Adm. de SAT.**


**ENHAVO:**


| | paĝo |
|---|---|
| La trologateco de l' mondo . . . | 405—06 |
| Letero el Persio . . . . . . . | 406—07 |
| La nacia reviviĝo en Blankrusio . | 407—08 |
| Ĉu likvido de l' milito? . . . . . | 407—08 |
| Tago el mia vivo . . . . . . | 408 |
| Banekskurso k propagando . . . | 409 |
| Diskutejo . . . . . . . . | 409 |
| Sennaciula Edukista Paĝo . . . | 410—11 |
| Tra Esperantio . . . . . . . | 411—15 |
| Korespondado, Anoncoj . . . . | 415—16 |


Presejo: Peuvag, Druckerei-Filiale Leipzig (Germanio)